der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

22. Jahrgang Nr. 136 (2/1986) ISSN 001 4-0619 30 Pf

UNESCO-Resolution zum Esperanto

Im Jahre 1954 nahm die UNESCO auf ihrer Generalkonferenz in Montevideo eine Resolution an (IV.1.422.-42224), in der „die durch das Esperanto erreichten Ergebnisse auf dem Gebiet des internationalen intellektuellen Austauschs und der Annäherung der Völker der Welt" zur Kenntnis genommen werden und der Generaldirektor beauftragt wurde, „die laufende Entwicklung in der Nutzung des Esperanto in Wissenschaft, Erziehung und Kultur zu verfolgen und zu diesem Zweck mit Universala Esperanto-Asocio in beide Organisationen betreffenden Fragen zusammenzuarbeiten".

Einige Jahre später erhielt Universala Esperanto-Asocio (UEA) bei der UNESCO den Konsultativstatus B. In vielen kulturpolitischen Fragen arbeitet der Esperanto-Weltbund im Bereich seiner Spezifik (Probleme der internationalen sprachlichen Kommunikation) mit der UNESCO zusammen. Von Bedeutung für die weitere Entwicklung der Beziehungen zwischen UNESCO und UEA war das Auftreten des Generaldirektors der UNESCO Amadou M'Bow auf dem 62. Esperanto-Weltkongreß 1977 in Reykjavik. Der Generaldirektor hielt auf diesem Kongreß eine wichtige Rede zu Fragen der Kommunikation (vgl. „der esprantist" Nr. 87, 1/78).. Anläßlich des 100. Jubiläums des Esperanto im Jahre 1987 nahm nun die UNESCO auf ihrer 23. Generalkonferenz in Sofia die Resolution Nr. 23 C / Res. 11.11. an, die von der Delegation Jugoslawiens eingebracht und von den Delegationen aus Bulgarien, Costa-Rica, VR China, Polen, San-Marino und Ungarn mit unterzeichnet wurde. Diese Resolution wurde von der Vierten Kommission der 23. Generalkonferenz angenommen und in der Plenartagung am 8. 11. 85 bestätigt.

Der Text der Resolution in den zwei offiziellen Arbeitssprachen Russisch und Englisch sowie in Esperanto und in deutscher Übersetzung ist auf den S. 35 — 38 dieses Heftes abgedruckt. Mit dieser Resolution wird der vielseitige und nicht immer ausreichend bekannte Beitrag der Esperanto-Bewegung für Völkerverständigung und gleichberechtigte, effektive internationale Kommunikation gewürdigt und den Mitgliedstaaten der UNESCO empfohlen, diese humanistischen Bemühungen gebührend zu unterstützen.

GRANDA SUKCESO EN SOFIO:

UNESKO ESPRIMIS SIAN SUBTENON DE ESPERANTO

La Centjariĝo de Esperanto en 1987 kaj la neceso disvastigi la utiligon de Esperanto en internaciaj organizoj kaj en lernejoj formis la kernon de grava rezolucio proponita de Jugoslavio kaj akceptita la 8-an de novembro de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, kunvenanta en Sofio, Bulgario. La rezolucio „gratulas la Esperanto-movadon okaze de ĝia centa datreveno", petas la Ĝeneralan Direktoron sekvi „la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj", kaj alvokas al la ŝtatoj-membroj, ke ili kunfestu la jubileon kaj „instigu al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado".

La rezulucio plue rekomendas al internaciaj neregistaraj organizoj ilian partoprenon en la jubileo kaj la utiligon de Esperanto en ilia laboro kaj informa agado.

Akceptite precize tridek unu jarojn post la unua rezolucio de Unesko pri Esperanto — rezolucio, kiu fine kondukis al starigo de formalaj konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko — la nuna rezolucio konsistigas kulminon de pli ol dek jaroj de zorga planado kaj proksima kunlaboro kun Unesko. La Universala Esperanto-Asocio ricevas apartan atenton en la rezolucio pro sia „disvastigado de informoj pri la agado de Unesko".

Kiel proponanto de la rezolucio, Jugoslavio trovis subtenon ĉe Pollando (lando de la kreinto de Esperanto, Ludoviko Zamenhof), Sanmarino (kies Akademio Internacia de Sciencoj uzas Esperanton),, Bulgario, Hungario, Ĉinio (kie okazos la Universala Kongreso de Esperanto en 1986), kaj Kostariko (loko de la Universitato por Paco, de Unuiĝintaj Nacioj). Aktivan subtenon de la rezolucio ankaŭ donis la delegacioj el Japanio kaj Ebura Bordo. Grandan meriton pri la sukceso de tiu ĉi iniciato havas la energia kaj efika diplomatio de la reprezentanto de UEA en la Ĝenerala Konferenco, Tibor Sekelj, kaj ankaŭ estrarano de UEA Petr Todorov kaj UEA-reprezentanto ĉe Unesko en Parizo Barbara Despiney. Sekelj faris longetan paroladon pri la rezolucio en la pleno de la Ĝenerala Konferenco kaj ankaŭ intervenis en la Kvara Komisiono, kie oni detale studis la rezolucion. Fine ĝi estis akceptita unuanime. (UEA)

Unesko aŭspicias seminarion de UEA pri multlingveco

Helpe de subvencio de la Sektoro pri Komunikado ĉe Unesko, Universala Esperanto-Asocio lastatempe okazigis seminarion pri „Plurlingveco kaj komunikado" en la Unesko-Domo en Parizo. Konataj sepcialistoj pri lingvo kaj komunikado el la tuta mondo ĉeestis la aranĝon, kiu okazis de la 25-a ĝis la 27-a de novembro 1985. La kunvenon oni kunvokis, laŭ iniciato de UEA, por esplori vojojn al pli proksima kunlaborigo de specialistoj pri lingva planado kun specialistoj pri komunika planado, kaj por studi elpaŝojn por pliintensigi la rolon de lingvistoj en la programoj de la Sektoro pri Komunikado. Inter la ĉeestantoj estis specialistoj kaj fakuloj el Japanio, Hindio, Maŭricio, Tunizio kaj Usono, aldone al multaj eŭropaj reprezentantoj. Partoprenis ekzemple Mustafa Masmoudi, iama Tunizia Ambasadoro ĉe Unesko, Lachman Khubchandani, konata specialisto pri lingva politiko kaj lingva planado, el Hindio, kaj la konata franca lingvisto André Martinet. Humphrey Tonkin, reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj, estis inter la partoprenantoj, kaj prezentis referaĵon pri „Teknologio kaj la Lingva Barilo". UEA planas aperigi la aktojn de la konferenco. (UEA)

Korekto pri recenzo (Gruhn)

En „der esperantist" 1/86 (135), p. 16 — 17 mi recenzis la verkon de W. Gruhn „Sprachen lernen (k)ein Problem?"

Sur p. 16 preseraro ĉe Gruhn estis „korektita" per nova preseraro. Punkto 3 devas teksti „Volapük ne estas evoluigita 1789 sed 1879 (p. 32). Verŝajne temas pri preseraro".

LA FONO DE LA ESPERANTO-REZOLUCIO

La rezolucio de Unesko de la 8-a de novembro 1985 sekvas tridek unu jarojn poste la rezolucion akceptitan de la Ĝenerala Konferenco en Montevideo, kiu rekonis la „rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo." Baldaŭ oni starigis konsultajn rilatojn inter Unesko kaj UEA. Kelkajn jarojn poste oni altigis ilian nivelon. En 1959, la kreinto de Esperanto, Ludvik Zamenhof, estis nomita unu el la „grandaj personecoj" de la homaro fare de la Estraro de Unesko okaze de la centa datreveno de lia naskiĝo. UEA daŭrigis la kunlaboron kun Unesko pri tio kio koncernis lingvon kaj kulturon, ricevante okazan financan subtenon por aperigo de Unesko-dokumentoj en Esperanto.

En 1974, kiam s-ro Emmanuel Chicot fariĝis reprezentanto de UEA ĉe Unesko, nova epoko de kunlaboro komenciĝis. S-ro Chicot starigis laborkomisionon por prizorgi la rilatojn de UEA kun Unesko, precipe koncerne junularon, kulturon, edukadon kaj komunikadon. UEA ludis aparte viglan rolon en la kreskanta programo de Unesko pri komunikado, prenate kiel temon de sia Universala Kongreso en 1977 „Lingvo kaj la rajto je komunikado" kaj starigante studgrupon pri komunikado inter la neregistaraj organizoj ligitaj al Unesko (NRoj). Tra ses jaroj, UEA estis ano de la Konstanta Komitato de NRoj ĉe Unesko.

Ĉe la UK en 1977, la Ĝenerala Direktoro de Unesko, Amadou-Mahtar M'Bow, festparolis. Li utiligis la okazon por anonci starigon de speciala komisiono por esplori tutmondajn komunikajn problemojn. UEA aktive rolis en la laboro de la Komisiono, liverante al ĝi esplordokumentojn kaj komentante ĝian provizoran raporton. Malgraŭ la intervenoj de UEA, la Komisiono malmulte atentis lingvajn demandojn, krom ke ĝi aperigis ĝeneralan rimarkon en sia raporto pri la potencialo de monda helplingvo. La Asocio daŭre atentigis pri la neceso studi lingvajn problemojn en la kunteksto de komunikaj problemoj, kaj lastatempe ricevis subvencion de Unesko por kunvenigi renkontiĝon de specialistoj pri tiu temo. Ĝi okazis en novembro 1985. Partoprenis interalie s-ro Mustafa Masmoudi, ano de la iama komisiono kaj ĉefparolanto en la inaŭguro de la Universala Kongreso en 1982.

La Asocio konservis proksimajn ligojn ne nur kun la Sektoro pri Komunikado ĉe Unesko, sed ankaŭ kun la Sektoro pri Edukado. Reprezentanto de la Eduka Sektoro ĉeestis la Universalan Kongreson en 1978 kaj unu el la ĉefaj deklaroj de Unesko pri internacia kompreniĝo aperis en Esperanto pro financa helpo de Unesko mem. UEA ankaŭ notis la tridekan datrevenon de la lanĉo de la Granda Projekto pri interŝanĝo de kulturaj valoroj inter oriento kaj okcidento (la tielnomata Projekto Oriento-Okcidento) per prezento al la Ĝenerala Direktoro de kompleto de dudeko da volumoj de grandaj majstroverkoj tradukitaj en Esperanton kiel la kontribuo de la Asocio al tiu Projekto.

La proksimaj ligoj inter UEA kaj Unesko verŝajne daŭros. La Asocio estas ĉiam konscia pri la graveco de internacia ordo bazita sur kompreno kaj scio, kaj sur rekono de la similoj kaj malsimiloj inter la kulturoj de la mondo. La rekono flanke de Unesko pri la kontribuo de Esperanto al internacia kompreniĝo kaj ĝia aparta rekono de Universala Esperanto-Asocio estas gravaj paŝoj laŭ la vojo al konsciiĝo pri la graveco de lingvoj en internaciaj aferoj kaj la neceso krei mondon kie lingva egaleco estas esenca principo. (UEA)

Materialo por du ekspozicioj

La Esperanta Klubo de Grodno preparas du ekspoziciojn „Por paco kaj kontraŭ nuklea minaco" kaj „Nia amiko — la naturo".

Sendu afiŝojn esperantajn kaj neesperantajn (ankaŭ falditajn) al USSR, 230023, Grodno—23, str. Dzerĵinskogo 1, Urba kultura domo, Esperanto-Klubo.

Grégoire Maertens
Prezidanto de UEA

Elokventa konfirmo de nia strategio

Ĝustatempe por mondskale substreki la gravecon de la Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo, Universala Esperanto-Asocio atingis novan grandan rekonon ĉe Unesko: la 23a sesio de la Ĝenerala Konferenco de tiu monda organizaĵo akceptis komence de novembro 1985 en Sofio Rezolucion pri la tutmonda festado de la Centjara Jubileo de Esperanto. Tiu nova Rezolucio, ne nur rekonas la grandan progreson, kiun la Internacia Lingvo faris de post 1954 (jaro de la unua Unesko-rezolucio pri Esperanto), sed ĝi diras multe pli ol tion. Ĝi atentigas pri la granda potencialo de Esperanto por la edukado al internacia kompreniĝo kaj proksimiĝo de la homoj kaj popoloj, kaj ĝi per sia rekta invito al ŝtatoj-membroj kaj neregistaraj organizaĵoj kreas vastan politikan bazon por grandskalaj jubileaj aranĝoj tutmonde.

Mi tute aparte kontentas, ke la Rezolucio rekonas la progreson, kiun Esperanto faris rilate sian tutmondiĝon — „penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj agadoj" —, ĉar ĝuste tio estis la ĉefaj priokupoj de UEA tra la pasinta jardeko. La sama strategio devas resti valida ne nur por UEA, sed por la tuta Esperanto-movado ankaŭ dum la venonta jardeko, ĉar la nova Rezolucio elokvente konfirmas la ĝustecon de la elektita vojo.

Kvankam UEA formale enkasigas la ĉefajn meritojn pro la nova rekono de Unesko, la tuta esperantistaro, ĉiuj landaj kaj fakaj organizaĵoj, kontribuis al tiu nova sukceso. La intimaj rilatoj, kiujn UEA jam de multaj jaroj flegas kun Unesko kaj ĝiaj ĉefaj funkciuloj, la engaĝiĝo de nia Asocio en la laboroj de Unesko — ĉio tio restus apenaŭ pli ol formalaĵo, se similajn rilatojn je la landa nivelo ne flegus niaj asocioj en Belgio, Bulgario, Ĉinio, Japanio, Jugoslavio, Pollando ktp. La jugoslava delegacio en la Ĝenerala Konferenco ne estus proponinta la Rezolucion sen la granda laboro, kiun la esperantistaro de tiu lando faras por disvastigi la Internacian Lingvon. Ankaŭ la ĉina delegacio ne estus subteninta la rezoluci-proponon sen la agado de Ĉina Esperanto-Ligo.

Se la Rezolucio estas nia komuna atingo, ĝi nun des pli fariĝas nia komuna tasko, ĉar ĝi fine havos nur tiom da graveco, kiom ni sukcesos doni al ĝi. Tiu dokumento estas nur la konvena ponto por aliri la registarajn kaj internaciajn organizaĵojn, partoprenigi ilin en la Jubileo kaj tiel atingi novajn, pli praktikajn, pli realajn sukcesojn kaj rekonojn al la Internacia Lingvo.

Ni ĉiuj certe konscias, ke nia tuta antaŭjubilea agado ne celas la Jubileon mem, sed la sorton de la Internacia Lingvo post la Centjara Jubileo. Al tia pensado aliĝas ankaŭ la Rezolucio mem, ĉar ĝi invitas la ŝtatojn-membrojn „instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado". La tuta Esperanto-komunumo devas kompreni, ke Unesko direktas tiun inviton ankaŭ al ĝi.

Komence de la nova jaro 1986 ni do staras antaŭ novaj taskoj kaj ne malpli da laboro ol ni havis tra la tuta centjara historio de Esperanto.

Ni laboru kaj esperu! Zamenhof mem signis al ni la vojon en sia samnoma poemo: „L' espero, l' obstino, kaj la pacienco — / jen estas la signoj, per kies potenco / ni paŝo post paŝo, post longa laboro, / atingos la celon en gloro."

Nia komuna laboro en 1986 karakteriziĝu per tiuj zamenhofaj obstino kaj pacienco, per organiziteco kaj kontinueco, kaj ĝi certe proksimigos nin al nia komuna celo!

Pri Esperanto en Ĉinio

Estas konate, ke la 71a Universala Kongreso de Esperanto okazos ĉijare en Pekino. Estas same rimarkate, ke dum la lastaj jaroj oni aŭdas sufiĉe multe pri la dinamika revigliĝo de Esperanto en Ĉina Popola Respubliko. Tio estas tre salutinda fakto. Ja estas tre grave, kian sintenon havas la ĉina ŝtato al Esperanto. Ke ĝi havas pozitivan sintenon, montras diversaj faktoj.

1. La ŝtato tre forte subvencias la mirinde viglan kaj altkvalitan eldonagadon de la Ĉina Esperanto-eldonejo, kiu nur en 1984 kaj 1985 eldonis pli ol 20 titolojn.
2. La revuo „El Popola Ĉinio", kiu fondiĝis en la jaro 1950 kiel la dua eksterlanden direktita revuo jam ekzistas pli ol 35 jarojn. La jubilean festaranĝon okaze de la 35-jariĝo de la revuo partoprenis vere elstaraj politikuloj, i. a. la vicprezidantoj de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso, Hujucz kaj Húang Húa. Hujucz cetere, estas ankaŭ prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo. [† 16. 1. 1986]
3. Radio Pekino (Beijing) disaŭdigas jam pli ol 20 jarojn (ekde 1964) regule en Esperanto, nuntempe ĉiutage 4foje.
4. Ekde 1978 ĉinaj delegacioj regule partoprenis Universalajn Esperantokongresojn kaj tie tre vigle partoprenis la kongresan laboron.
5. Ekde 1982 efikas dekreto de la edukministerio, laŭ kiu estas permesate instrui Esperanton en superaj lernejoj. Pro tio nuntempe kursoj ekzistas en pli ol 50 superaj lernejoj kaj institutoj.
6. Oni multon faras por eduki bonajn esperantistojn en la lando per eldono de lerniloj kaj revuoj. Ekz. la ĉinlingva ĵurnalo „La mondo" aperas en 30 — 40 000 ekzempleroj kaj estas la organo de ĈEL.

Kaj laste — post tiu tute nekompleta listo de konkreta Esperanta kaj esperantista agado, ni ne povas rezisti la tenton, simple listigi tiujn titolojn de verkoj, kiujn donacis al GDREA la ĉina gasto, s-ro Li Shijun (kp. paĝon 30), kaj kiuj eldoniĝis nur dum la lastaj 4 jaroj:

— Rakontoj pri Afanti. Ĉinaj popolaj rakontoj. Ilustrita. 71 p., 1982
— Papilia Fonto. Ĉinaj popolaj rakontoj. Ilustrita. 67 p., 1984
— Magia Ŝipo. Ĉinaj popolaj rakontoj. Ilustrita. 73 p. 1984
— Saĝo-Sako. Ĉinaj popolaj rakontoj. Ilustrita, 73 p., 1983
— Bukedo al Vi. Mikronoveloj. Ilustrita, 94 p., 1984
— La Feliĉa Birdo. Ĉinaj popolaj rakontoj. Ilustrita. 49 p., 1984
— Plaŭ! Plaŭ! Kolora bildrakonto. 1985
— Lutro kaj Bufo. Kolorilustrita fabelo de Ji-nacieco. 1984
— Kokido Venĝis Sian Panjon. Kolorilustrita fabelo de Mjaŭ-nacieco. 1984
— Brava Kolombido. Kolora fabelo de Han-nacieco. 1984
— Petolema kaprido. Kolora fabelo de la mongola nacieco. 1984
— Du katetoj. Kolora fabelo de la tibeta nacieco. 1984
— Anaseto kaj koketo. Koloraj bildrakontoj. 1985
— Serĉi Panjon. Kolora bildrakonto. 1983
— Bonkora Ŝjandon. Kolora bildrakonto. 1984
— Bestoĝardeno. Pribestaj strofoj kun koloraj pentraĵoj. 1985
— Albumo pri Ĉinio .Koloraj fotoj. 96 p. 1984
— Dek ses urboj de Ĉinio. 176 p. 1984
— Pitoreska Pekino. 72 p. 1984
— 40 Vidindaj lokoj en Ĉinio. 251 p. 1984
— Kolorigu! 6 kajeroj por infanoj por memkolorigi. 1984
— Senmortigaj Fruktoj. Kolora bildrakonto. 63 p. 1984
— Chun-Chan-Yen: Montara Vilaĝo. El la angla tradukis William Auld. 264 p. 1984
— Ĝuo Moĵuo: Bronza Tigro. Kvinakta historia dramo. 122 p. 1985
— Ĉinio en bildoj. N-ro 46. Tajĝi Ĉjŭan. Bildoj kaj komentoj pri ĉina luktarto (movarto). 1984

Vizito el Ĉinio

La Centra Estraro de GDREA tre ĝojis, ke vizitis nian landon konata ĉina esperantisto, nome s-ro Li Shijun, kiu apartenis al la partoprenintoj de la metodiko de Esperanto-instruado al plenkreskuloj", kiu okazis de la internacia seminario „Problemoj de la 9a ĝis 14a de decembro 1985 en Bad Saarow. Feliĉe s-ro Li jam venis kelkajn tagojn antaŭ la seminario kaj povis resti kelkajn pluajn post la seminario. Tiel li havis la eblecon iom konatiĝi kun Berlin, ĉefurbo de GDR, kun Potsdam (Cecilienhof kaj Sanssouci), kun la agado de GDREA sed ankaŭ povis viziti kelkajn familiojn en Berlin tiel konatiĝante kun la vivo de GDR-civitanoj. La vizito de s-ro Li okazis hazarde samtempe kun la vizito de la prezidanto de la Popola Parlamento de GDREA, Horst Sindermann, en Pekino. Bela hazardo, espereble simptoma.

La partoprenintoj de la seminario de Bad Saarow kaj esperantistoj de Berlin povis informiĝi pri la multflanka agado de la ĉinaj esperantistoj.

S-ro Li estis tre kompetenta oratoro kaj diskutpartnero. Li estas la vicĉefredaktoro de la monde konata kaj alte aprezata revuo „El Popola Ĉinio", vicĉefdirektoro de la ĉina Esperanto-eldonejo kaj membro de la Konstanta Komitato (= prezidio) de Ĉina Esperanto-Ligo. Kun ĝojo la aŭskultantoj notis ankaŭ la tre altan lingvan nivelon de la ĉina gasto, kiu parolis Esperanton mirinde flue kaj senakcente. Nu — ne mirige, s-ro Li ja ankaŭ estas membro de la Akademio de Esperanto, verkis lernolibrojn kaj faris multajn tradukojn el la ĉina lingvo esperanten.

GDREA forte esperas, ke la vizito de s-ro Li en GDR donos impulsojn al la estonta kunlaboro inter la esperantistoj inter Ĉina Popola Respubliko kaj GDR. Tio ankaŭ inkludas la esperon pri la estonta reaboneblo de „El Popola Ĉinio" kaj la aĉeteblo en GDR de la valoraj ĉinaj eldonaĵoj. Sed kiam kaj kiom tio realiĝos, dependas de la pluevoluado de la rilatoj inter Ĉino kaj GDR, por kies pozitiva perspektivo ekzistas tre bonaj simptomoj.

Detlev Blanke

Radio Pekino en Esperanto

Aŭskultu la radiodisaŭdigojn de Radio Pekino. En Eŭropo ili estas aŭskulteblaj je 21,00 — 21,30 mezeŭropa tempo sur la kurtondoj 40,1 (7470 khz), 32 (9365 khz), 30,1 (9965 khz). Se vi aŭskultis, skribu al: **Radio Beijing,** Esperanto-Sekcio, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.

Forpasis Hujucz

La 16-an de januaro 1986 forpasis en Pekino la prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, vicprezidanto de la Ĉina Popola Kongreso, meritplena esperantisto kaj socia aganto Hujucz.

GDREA esprimas sinceran kondolencon al Ĉina Esperanto-Ligo.

KIK '86

Jam la kvaranfojon Bulgara Esperantista Asocio invitas aktivulojn el socialismaj landoj partopreni la Konstantan Internacian Kvalifikejon (KIK), kiu okazos de 1a ĝis 10a de septembro 1986 en la konata belega Internacia Esperanto-Lernejo Pisanica, en la pitoreska Rodopi-montaro.

La celo de KIK estas doni al aktivuloj de socialismaj landoj eblecon aŭskulti kaj diskuti prelegojn pri ĉefaj problemoj de la aktuala Esperanto-movado, kun aparta atento pri la specifaĵoj en socialismaj landoj. Kiu do interesiĝas pri tiu grava celo kaj samtempe volas konatiĝi kun la jam mondfama Esperanto-Domo en Pisanica en puraera, belega pejzaĝo, tiu sin anoncu ĉe GDREA. La restado kostas 205 levojn kaj inkluzivas tranoktadon (en dulitaj aŭ trilitaj ĉambroj kun bela balkono kaj duŝejo), manĝadon, kulturprogramon (kun ekskursoj) kaj veturadon de Sofia al Pisanica kaj reen. Krome, kompreneble, ĉiu devas mempagi sian flugon (resp. trajnoveturon). Interesuloj pri partopreno en KIK bv. legi la publikigitajn raportojn pri KIK 1 — 3 en „der esperantist" 121 (5/83), p. 119; 128 (6/84), p. 135 — 136; 134 (6/85), p. 142.

Ili sin anoncu ĉe GDREA, kiu sendas pliajn informojn pri la programo, pageblecoj k. t. p.

Pri plenkreskula Esperanto-instruado

De la 9a ĝis 14a de decembro 1985 en la gastdomo kaj seminariejo de Kulturligo de GDR, en Bad Saarow, kunvenis entute 37 pedagogoj, kursgvidantoj kaj aliaj fakuloj, por trakti la diversajn aspektojn de la temo „Problemoj de la instruado de Esperanto al plenkreskuloj". La partoprenintoj venis el Bulgario, Činio, ČSSR, FRG, GDR, Granda Britio, Hindio, Hungario, Italio, Nederlando kaj Pollando. Estis prezentitaj jenaj prelegoj:

— Zsófia Barossné-Kóródy (Hungario): Koresponda Esperanto-Kurso: faktoj kaj problemoj
— d-ro Erich Spitz, CSc (ČSSR): Problemoj de skribaj kursoj
— d-ro Till Dahlenburg (GDR): Stato kaj problemoj de la Esperanto-instruado en GDR
— Shijun Li (Činio): Esperanto-instruado en Činio
— Teresa Voelkel-Skrzypczak (Pollando): Informo pri kursoj por plenkreskuloj en Poznan
— Halina Oleszek (Pollando): Kiel la laboro kun geinfanoj povas varbi la gepatrojn al Esperanto-kursoj
— Yashovardhan (Hindio): Esperantlingva literaturo kiel lernmotivilo
— Zsuzsa Barcsay (Hungario): Pri kulturfono de Esperanto en diversaj lernolibroj
— Ryszard Rokicki (Pollando): Kompetenckreaj problemoj dum la instruado de la planlingvo Esperanto
— Eva Farkas-Tatár (Hungario): Miaj spertoj en la instruado de Esperanto al plenkreskuloj (pri la ČE-metodo)
— Rumjana Janeva (Bulgario): Principoj de la lernolibro de Neno Janev
— Oene Hoekstra (Nederlando): Esplorkreiva metodo (kun praktikaj demonstroj helpe de la seminarianoj)
— Grahame Leon-Smith (Grandbritio): Perkomputila lernado
— Wera Dehler (GDR): Problemoj de unuecigo de terminologiaj kaj terminografiaj aktivecoj en Esperanto
— d-ro Till Dahlenburg (GDR): Kelkaj problemoj de pedagogia terminologio en Esperanto
— Marin Bacev (Bulgario): La sugestopedia metodo de profesoro Lozanov
— Andrzej Pettyn (Pollando): Utiligo de dialogoj kiel substituigeblaj elementoj en la evoluigo de la parolkapablo
— Andrzej Pettyn (Pollando): Modeloj de demandofrazoj en la Esperanto-kursa praktiko
— Achim Zettier (GDR): Psikologiaj kaj pedagogiaj konsideroj pri Esperanto-kursoj
— d-ro Werner Bormann (FRG): Tutlanda detala plano por instruado de Esperanto al plenkreskuloj
— Irena Szanser (Pollando): Kadra projekto de kurso por rajtigi Esperanto-kursgvidantojn.

Krome estis kelkaj aliaj interesaj programeroj. Marin Bacev informis la seminarianojn pri la antaŭ nelonge akceptita rezolucio de UNESKO favore al Esperanto. Li Shijun dum vespera programero vaste kaj detale prezentis la revuon „El Popola Činio" kaj la ĉinan Esperanto-eldonejon. Elsbeth Bormann lumbildprelegis pri la universalaj kongresoj en Brazilo kaj Vankuvero. Grahame Leon-Smith entuziasmigis komputilemajn seminarianojn. Kaj Andrzej Pettyn prezentis sonrevuon pri la Esperantaj disaŭdigoj de Radio Polonia. La unuaj du seminarioj pri metodiko de la instruado de Esperanto okazis 1984 kaj 1985 (aprilo) en Pollando. La kvara okazos 1986 en Hungario.

Šakturniro en Slovakio

La ŝaka sekcio de SEA kunlabore kun E-klubo ĉe Domo de kulturo en Žilina invitas vin al la:

6-a ŝakturniro pri la migranta pokalo de SEA, kiu okazos en la tagoj 13. — 14. 9. 1986 en Domo de kulturo en Žilina. La ŝakturniron povas partopreni anoj de SEA, ČEA kaj eksterlandanoj parolantaj Esperante. Partoprenantoj estos envidigitaj en du kategoriojn registritaj kaj neregistritaj ŝakludantoj. La migrantan pokalon povas akiri nur ano de SEA. Informoj pri ŝakturniro petu ĉe s-ano SALÁT MIROSLAV, 023 35 OCHODNICA 126, ČSSR

„Ni partoprenis la liberigon"

Sub tiu moto pasis la jam 8a renkontiĝo de iamaj membroj de la Germana Laborista Esperanto-Asocio (LEA), de 30a de oktobro ĝis 1a de novembro 1985 en Zwickau. Kolektiĝis 45 veteranoj, kiuj ne nur interŝanĝis memorojn pri la agado de la laboristaj esperantistoj sed ankaŭ montris per tre interesaj diskutkontribuoj, ke ili apartenis al la „aktivuloj de la unua horo", t. e. la „unua horo" post la fino de la mondmilito. Erich Würker, merita inventisto, estis direktoro de granda uzino. Li rakontis, kiel per helpo de la Ruĝa Armeo oni denove kreis bazon por produktado de teksaĵoj. La prokurorino Friedel Bärsch kontribuis pri la unuaj jaroj de malfacila komenco, pri la unuiĝo de socialdemokratia kaj komunista partioj, kies unuan partian kongreson en Berlin ŝi partoprenis. La juristino Elsa Gruhle rakontis travivaĵojn pri la helpo de sovetiaj soldatoj al la malsatantaj infanoj en Leipzig. Ludwig Schödl apartenas al tiuj komunistoj kaj esperantistoj, kiuj grave kontribuis al la restarigo de la Esperanto-movado en GDR. Li informis pri diversaj sukcesoj kaj malsukcesoj de la agado por la reorganizado de la movado. Rudolf Burmeister montris filatelaĵojn pri la laborista Esperanto-movado. Rudi Weiß, el la gastiginta urbo, informis pri la historio de LEA en Zwickau. La prezidanto de GDREA, Hans Heinel, kaj la sekretario, d-ro Detlev Blanke respondis multajn demandojn pri la aktuala agado de la asocio.

La malfermon de la aranĝo partoprenis la vicprezidanto de la Distrikta Estraro de Kulturligo en Zwickau, d-ro Christian Brennecke, kaj la membro de la Distrikta Estraro de KL Karl-Marx-Stadt, Günter Schubert. Valoras mencii la muzika-literaturan vesperon pri Joseph Haydn kaj la diapozitivajn prelegojn pri Zwickau kaj la pasintaj renkontiĝoj. — e

9a. Esperantologia Konferenco

Kadre de la 71a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino okazos la 9a Esperantologia Konferenco. La kadra temo estas „Internacieco de Esperanto el neeŭropa vidpunkto".

Estas bonvenaj prelegoj pri la temo, ne pli ol 20 — 30minutaj. La konferenco celas prilumi la ecojn de Esperanto, aparte, se eble, kompare al nehindeŭropaj lingvoj.

Tre gravas pro tio la kontribuo de nehindeŭropaj prelegantoj, kiujn ni aparte bonvenigas.

Proponojn por kontribuoj bv. sendi al d-ro Detlev Blanke, DDR—1141 Berlin, Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113—05.

Ronda jubileo de Ruth Schonert

Nia asocia sekretariejo estas malgranda. Laboras en ĝi 3 oficistoj: Unu el ili estas la administra sekretariino Ruth Schonert. Ŝi jam laboras 15 jarojn en la oficejo kaj plenumas multajn gravajn taskojn. Mem regante Esperanton ŝi skribas sennombrajn leterojn, multajn manuskriptojn en la ne ĉiam bone legebla skribo de sia ĉefo, ordigas financajn aferojn, dissendas materialojn, organizas plenkunsidojn de GDREA kaj aliajn kunvenojn.
Multaj eksterlandaj kaj enlandaj esperantistoj konas ŝin persone. Nun ŝi festis rondan vivojubileon dum majo 1986. Kaj ni gratulas al ŝi tre kore, esperante, ke ŝi ankaŭ post tiu ĉi jubileo ankoraŭ multe aktivados en la oficejo, por Esperanto, por GDREA. Ni deziras al ŝi sanon kaj bonfarton por la estonteco.

CE de GDREA

La 7a Interlingvistika Seminario

Ĝi okazis de la 10a ĝis 14a de novembro 1985 en Ahrenshoop, la jam tradicia loko por tiu unika seminaria serio.
La kadra temo de la 7a estis „Lingvopolitiko — lingvoplanado — planlingvoj: socilingvistikaj aspektoj de interlingvistiko". Ankaŭ ĉi-foje la seminario estis reĝisorita de d-ro Detlev Blanke kaj prof. Georg F. Meier. Partoprenis entute 35 lingvistoj el 4 universitatoj, du teknikaj altlernejoj, po 1 inĝeniera kaj pedagogia altlernejoj kaj de la Akademioj de Scienco kaj de Pedagogio. Inter la partoprenintoj estis 7 universitataj profesoroj (inter ili unu akademiano) kaj 17 doktoroj de lingvoscienco. Interese estas, ke ĉi-foje al la partoprenantaro ankaŭ apartenis specialistoj por malpli konataj lingvoj, ekz. pri amhara kaj somala lingvoj, pri korea, indonezia, vaska, araba kaj japana lingvoj. Tiu konsisto de la seminarianoj rezultis diskutojn ne nur (kiel tro ofte) karakterizitajn per tro eŭropeca rigardo. La prelegoj estis jenaj (laŭ la prezentita sekvo):

— „Aspektoj de la lingvopolitiko" (prof. d-ro Georg F. Meier, Humboldt-Universitato, Berlin)
— „Interlingvistiko kaj lingvoplanado" (d-ro sc. Detlev Blanke, Kulturligo, Berlin)
— „Pri la rolo de la Latino kiel internacia komunikilo" (akad. prof. d-ro sc. Johannes Irmscher, Akademio de Sciencoj, Berlin)
— „Bazaj demandoj de interlingvistiko kaj esperantologio" (d-ro sc. Detlev Blanke, Kulturligo, Berlin)
— „Socilingvistikaj aspektoj de interlingvistiko" (prof. d-ro sc. Manfred Uesseler, Teknika Altlernejo, Magdeburg)
— „Pri la sociologia strukturo de la komunikada komunumo de Esperanto — ĉe la ekzemplo de GDREA" (Inĝ. Linde Knöschke, GDREA, Berlin)
— „Lingvistikaj publikaĵoj de Akademie-Verlag Berlin" (lektorino Anneliese Funke, Akademie-Eldonejo Berlin)
— „Planlingvaj komunikadaj komunumoj" (d-ro sc. Detlev Blanke, Kulturligo, Berlin)
— „Pri la terminologio de la planlingvaj problemoj" (d-rino Rosemarie Ranft, Humboldt-Universitato Berlin)
— „Lingvopolitika kaj interna lingvoevoluo kiel faktoroj de diverĝaj kaj konverĝaj tendencoj en slavaj lingvoj" (prof. d-ro sc. Karl Gutschmidt, Humboldt-Universitato Berlin)
— „Lingvopolitiko kaj lingvoplanado en Afriko — prezentita ĉe la ekzemplo de Etiopio kaj Somalio" (d-rino sc. Catherine El-Solami-Mewis, Humboldt-Universitato Berlin)
— „Pri la socilingvistika situacio de la vaska lingvo" (d-rino Claudia Perlick, Humboldt-Universitato Berlin)
— „Eŭropaj influoj je la leksiko de Bahasa Indonezia" (d-ro Erich-Dieter Krause, Karl-Marx-Universitato Leipzig)
— „Lernmetodoj kaj — procedoj por racia alproprigo de fremdaj lingvoj" (prof. d-ro habil. Klaus Günther, Akademio de pedagogiaj sciencoj, Berlin)
— „Pri la historio de la lernado de fremdaj lingvoj" (d-ro Wolf-Dietrich Wendt, Humboldt-Universitato Berlin)
— „Planlingvoj sur sonbendoj: Esperanto, Ido, Occidental-Interlingua" (d-ro sc. Detlev Blanke, Kulturligo, Berlin)
— „Gramatikaj kategorioj en etnolingvoj kaj en Esperanto" (prof. d-ro habil. Georg F. Meier, Humboldt-Universitato Berlin)
— „Esprimo de pasiveco en Esperanto" (d-ro Ronald Lötzsch, Akademio de Sciencoj, Berlin)
— „La artikolo en Esperanto kaj en etnolingvoj" (PhDr. Erich Spitz, Csc, Ostrava, ČSSR)
— „Problemoj de la fakterminologio kaj ĝia normigado en Esperanto" (Wera Dehler, Kulturligo, Berlin)
— „Esperanto en la praktiko: diapozitivoj" d-ro sc. Detlev Blanke, Kulturligo, Berlin. Laŭ deziro de la partoprenintoj en Esperanto)
— „Pri komputila pretigo de radikaro de Esperanto" (prof. d-ro sc. Joachim Dietze, Universitato Halle).

Kiel kutime ankaŭ ĉifoje la partoprenintoj ricevis la germanlingvajn resumojn de la prelegoj.

D. Blanke

750jaroj Berlin: Partoprenu ekspozicion!

En 1987, la loĝantoj de Berlin festos la 750-jaran ekzistan de sia urbo.
Kune kun la subdistrikta estraro de Libera Germana Junularo (FDJ), la Junulara Esperanto-Grupo en Kulturligo en Berlin-Marzahn deziras organizi internacian ekspozicion. Ĝia devizo estos: „Gastoj el la tuta mondo vidas nian Berlinon — urbo de la paco". Precipe ni turnas nin al junaj esperantistoj kaj al tiuj, kies koro batas por la junularo.
La enhavon de tiu ekspozicio konsistigu fotoj (formato 9 x 12 ĝis 18 x 24 cm), desegnaĵoj, bildoj, rakontoj kaj raportoj. Per ili estu videblaj Viaj tute privataj impresoj pri tiu nia urbo.
— Kio plaĉis al Vi, kio impresis Vin?
— Kiel Vi vidis la vivon de niaj civitanoj en la batalo por paco?
Ekde nun ĝis la 1-a de oktobro 1986 ni atendas Viajn kontribuaĵojn. Poste ni kunmetos la ekspozicion, kiun oni povos rigardi dum la jaro 1987 en pluraj lokoj de Berlin.

Vi rericevos Viajn kontribuaĵojn, se Vi tion aparte deziras. Al ĉiuj kontribuontoj ni sendos honordiplomojn. La plej bonaj kontribuaĵoj estos premiitaj kaj publikigitaj.

Ni petas Vin ĉiujn subteni nian entreprenon kaj per tio pruvi la avantaĝojn kaj la kapablon de Esperanto kaj ĝia movado.

Nia adreso:

Junulara Esperanto-Grupo en Kulturligo de GDR
(Ausstellung '87), DDR-1141 Berlin-Marzahn, Prignitzstr. 100

Kun plej bonaj salutoj!
Subdistrikta estraro de
Libera Germana Junularo
(FDJ), Berlin-Marzahn
Junulara Esperanto-Grupo
en Kulturligo de GDR,
Berlin-Marzahn

Termine für 1986

— 17. — 25. Mai: Kulturseminar der Jugend in Gusow. Teilnahmegebühr: M 85. Informationen: Andreas Penk, 1140 Berlin, Franz-Stenzer-Str. 31.
— 16. — 23. August: Somera Esperantista Familia Tendaro (SEFT) in Thomsdorf bei Feldberg. Informationen: Werner Pfennig, 2000 Neubrandenburg, Leibnizstr. 5/67
— 23. — 30. 8. 86: Potsdama Somera Esperantista Tendaro (PoSET). Informationen: Brigitte Raabe, 1546 Staaken, Sulzbacher Steig 1
— 1. — 7. September: Kleriga kaj turisma seminario ĉe Krossinsee. Informojn: GDREA
— 5. — 10. Oktober: 9. Touristentreffen der Esperantisten im Erzgebirge, in Antonshöhe bei Schwarzenberg. Informationen: Rudolf Eichler, 9430 Schwarzenberg, Hermann-Matern-Str. 21
— 12. — 17. Oktober: Jugendseminar (mit Sprachkursus, vormittags, nachmittags Vorträge) in Lychen (kostenlos). Informationen: GDREA
— 27. Oktober — 1. November: Intensivkurs für Anfänger in Bollmannsruh bei Brandenburg. Beitrag M 125. Informationen bei Esperanto-Verband, Bezirksvorstand Potsdam, 1500 Potsdam, Mangerstr. 34/36
— 10. — 15. November: Internationales Seminar „Historische und soziologische Aspekte der Kommunikationsgemeinschaft des Esperanto" in Bad Saarow. Informationen: GDREA
— Junulara Biciklado, 11. — 24. 8. 86 de Lübbenau al Thomsdorf. Informojn ĉe Ronald Schindler, 1200—Frankfurt/O., Bardelebenstr. 5
— Junulara Esperanta Pacrenkontiĝo, 25. — 28. 9. 1986 en Pöhl (Junulara Gastejo). Por GDR-anoj 50,— M. por eksterlandanoj 68,— M. Informojn ĉe Christian Papenmeier, DDR-9156 Oelsnitz, Obere Hauptstr. 104
— 3a Parkrenkontiĝo Wörlitz, 5. 7. 1986. Informojn ĉe Eberhard Brauser, 4407 Oranienbaum, Gräfenhainichener Str. 20.

REZOLUCIO DE UNESKO 23 C / Res. 11. 11.

Festado de la centjarigo de Esperanto

La Ĝenerala Konferenco,

Konsiderante, ke ĝi en sia sesio de 1954, okazinta en Montevideo, per la rezolucio IV.1.4.422-4224 notis la rezultojn, atingitajn pere de la internacia lingvo Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj reciproka kompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonis, ke tiuj kongruas kun la celoj kaj idealoj de Unesko,

Memorigante, ke Esperanto intertempe faris konsiderindan progreson kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj, penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de homaj agadoj,

Rekonante la grandajn eblecojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj de malsamaj naciecoj,

Notante la tre gravan kontribuon de la Esperanto-movado, kaj precipe de Universala Esperanto-Asocio, al la disvastigado de informoj pri la agado de Unesko, same kiel ĝia partopreno en tiu agado,

Konscia pri la fakto, ke en 1987 oni festos la centjariĝon de la ekzisto de Esperanto,

1. **Gratulas** la Esperanto-movadon okaze de ĝia centa datreveno;
2. **Petas** la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel rimedon por plibonigi la komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj;
3. **Invitas** la Ŝtatojn-Membrojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkondudo de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado;
4. **Rekomendas** al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj aliĝi al la festado de la centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn, inkluzive de tiuj pri la agado de Unesko.

Akceptita de la Ĝenerala Konferenco de Unesko
la 8an de novembro 1985 en Sofio.

Rimarko

La rezolucio portis la provizoran numeron XI.4.4.218. Tiel ĝi eniris en sia Esperanta traduko la Esperantan gazetaron. Sed tio ne estas la oficiala numero. Post la akcepto de la rezolucio en la plenkunsido de la Ĝenerala Konferenco kaj publikigo en la protokol-libro ĝi ricevis la definitivan numeron 23C / Res. 11.11. Tio signifas (laŭ anglalingvaj mallongigoj) 23-a konferenco, rezolucio n-ro 11 en la 11-a programo (t. e. kulturo). La germanan tradukon laŭ peto de GDREA disponigis la UNESKO-Komisiono de Germana Demokratia Respubliko.

Resolution of UNESCO 23 C / Res. 11. 11.

Celebration of centenary of Esperanto

The General Conference,

Considering that the General Conference in its session of 1954 in Montevideo, by its resolution IV.1.4.422-4224, takes note of the achievements through the international language Esperanto in the field of international intellectual exchange and mutual understanding of the people's of the world, and recognizes that these results agree with the aims and ideals of Unesco.

Recalling that Esperanto has made in the meantime considerable progress as a means for the advancement of mutual understanding of peoples and cultures of different countries, penetrating in most regions of the world and most human activities,

Recognizing the great potential of Esperanto for the international understanding and the communication among peoples of different nationalities,

Taking note of the considerable contribution of the Esperanto movement and especially of the Universal Esperanto Association for the spreading of information about the activities of Unesco, as well as its participation in its activities,

Aware of the fact that in 1987 Esperanto celebrates its centenary of existence,

1. **Congratulates** the Esperanto movement on its centenary,

2. **Requests** the Director-General to continue following with attention the development of Esperanto as a means for better understanding among different nations and cultures,

3. **Invites** the Member States to mark the centenary of Esperanto by suitable arrangements, declarations, issuing of special postal stamps etc., and to promote the introduction of a study programme on the language problem and Esperanto in their schools and higher educational institutions,

4. **Recommends** to the international non-governmental organizations to join the celebration of the centenary of Esperanto, and to consider the possibility of the use of Esperanto as a means for the spreading of all kinds of information among their members, including information on the work of Unesco.

Rimarko

La rezolucio portis la provizoran numeron XI.4.4.218. Tiel ĝi eniris en sia Esperanta traduko la Esperantan gazetaron. Sed tio ne estas la oficiala numero. Post la akcepto de la rezolucio en la plenkunsido de la Ĝenerala Konferenco kaj publikigo en la protokol-libro ĝi ricevis la definitivan numeron 23C / Res. 11.11. Tio signifas (laŭ anglalingvaj mallongigoj) 23-a konferenco, rezolucio n-ro 11 en la 11-a programo (t. e. kulturo). La germanan tradukon laŭ peto de GDREA disponigis la UNESKO-Komisiono de Germana Demokratia Respubliko.

Resolution 11. 11. angenommen von der Generalkonferenz der Unesco auf ihrer 23. Tagung in Sofia, 1985

Würdigung des 100jährigen Jubiläums des Esperanto

Die Generalkonferenz,

Ausgehend davon, daß die Generalkonferenz auf ihrer Tagung 1954 in Montevideo in ihrer Resolution IV.1.4.422-4224 die von der internationalen Sprache Esperanto auf dem Gebiet des internationalen geistigen Austauschs und des gegenseitigen Verständnisses der Völker der Welt erzielten Ergebnisse zur Kenntnis nahm und anerkannte, daß diese Ergebnisse mit den Zielen und Idealen der Unesco übereinstimmen,

In Erinnerung daran, daß Esperanto in der Zwischenzeit beträchtliche Fortschritte als Mittel zur Förderung des gegenseitigen Verständnisses der Menschen und Kulturen verschiedener Länder gemacht hat und dabei in die meisten Regionen der Welt und die meisten menschlichen Tätigkeiten eingedrungen ist,

In Anerkennung des großen Potentials des Esperanto für die internationale Verständigung und die Kommunikation zwischen den Menschen verschiedener Nationalitäten,

In Kenntnis des wichtigen Beitrages der Esperanto-Bewegung und insbesondere des Esperanto-Weltbundes zur Verbreitung von Informationen über die Arbeit der Unesco sowie ihrer Beteiligung an den Unesco-Aktivitäten,

In dem Bewußtsein, daß Esperanto 1987 den 100. Jahrestag seines Bestehens begeht,

1. **Gratuliert** der Esperanto-Bewegung zu ihrem 100jährigen Jubiläum;
2. **Bittet** den Generaldirektor, weiterhin aufmerksam die Entwicklung des Esperanto als Mittel zur besseren Verständigung zwischen den verschiedenen Nationen und Kulturen zu verfolgen;
3. **Fordert** die Mitgliedstaaten **auf,** das 100jährige Jubiläum des Esperanto durch geeignete Veranstaltungen, Erklärungen, die Herausgabe von Sonderbriefmarken usw. zu würdigen und die Einführung eines Studienprogramms zum Sprachproblem und Esperanto in ihren Schulen und Hochschuleinrichtungen zu unterstützen;
4. **Empfiehlt,** daß sich die internationalen nichtstaatlichen Organisationen der Würdigung des 100jährigen Jubiläums des Esperanto anschließen und die Möglichkeit prüfen, Esperanto als Mittel für die Verbreitung aller Arten von Informationen unter ihren Mitgliedern, einschließlich Informationen über die Unesco-Arbeit, einzusetzen.

Rimarko

La rezolucio portis la provizoran numeron XI.4.4.218. Tiel ĝi eniris en sia Esperanta traduko la Esperantan gazetaron. Sed tio ne estas la oficiala numero. Post la akcepto de la rezolucio en la plenkunsido de la Ĝenerala Konferenco kaj publikigo en la protokol-libro ĝi ricevis la definitivan numeron 23C / Res. 11.11. Tio signifas (laŭ anglalingvaj mallongigoj) 23-a konferenco, rezolucio n-ro 11 en la 11-a programo (t. e. kulturo). La germanan tradukon laŭ peto de GDREA disponigis la UNESKO-Komisiono de Germana Demokratia Respubliko.

Резолюция Юнеско 23 C/Res. 11. 11.

Празднование столетия существования языка эсперанто

Генеральная конференция,

учитывая, что Генеральная конференция на своей сессии 1954 г. в Монтевидео в резолюции IV. 1. 4, 422 - 4224 отмечает успехи, достигнутые при помощи международного языка эсперанто в области международного интеллектуального обмена и взаимопонимания народов мира, а также признает, что эти результаты согласуются с целями и идеалами ЮНЕСКО,

напоминая, что эсперанто достигло тем временем значительного прогресса в качестве средства развития взаимопонимания народов и культур различных стран, проникая в большинство регионов мира и в большую часть человеческой деятельности,

признавая огромные потенциальные возможности эсперанто для международного взаимопонимания и общения между людьми различных национальностей,

принимая к сведению значительный вклад движения эсперанто и, в особенности Всемирной ассоциации эсперантистов, в распространение информации о деятельности Организации,

учитывая тот факт, что в 1987 г. будет отмечаться столетие существования языка эсперанто,

1. **приветствует** движение эсперанто в связи со столетием его существования;

2. **предлагает** Генеральному директору продолжать внимательно следить за развитием языка эсперанто в качестве средства улучшения взаимопонимания между разлиными нациями и культурами;

3. **предлагает** государствам-членам отметить столетие языка эсперанто путем проведения соответствующих мероприятий, принятия деклараций, выпуска специальных почтовых марок и т.д.; а также содействовать введению в своих школах и высших учебных заведениях учебной программы, посвященной языковым проблемам и эсперанто;

4. **рекомендует** неправительственным международным организациям принять участие в праздновании столетия языка эсперанто и рассмотреть возможность его использования в качестве средства распространения всех видов информации среди своих членов, включая информацию о деятельности ЮНЕСКО.

Rimarko

La rezolucio portis la provizoran numeron XI.4.4.218. Tiel ĝi eniris en sia Esperanta traduko la Esperantan gazetaron. Sed tio ne estas la oficiala numero. Post la akcepto de la rezolucio en la plenkunsido de la Ĝenerala Konferenco kaj publikigo en la protokol-libro ĝi ricevis la definitivan numeron 23C / Res. 11.11. Tio signifas (laŭ anglalingvaj mallongigoj) 23-a konferenco, rezolucio n-ro 11 en la 11-a programo (t. e. kulturo). La germanan tradukon laŭ peto de GDREA disponigis la UNESKO-Komisiono de Germana Demokratia Respubliko.

Aperis „Internationale Plansprachen“

Fine de 1985 aperis en Akademie-Verlag Berlin la 408paĝa libro de Detlev Blanke „Internationale Plansprachen. Eine Einführung“ (Internaciaj Planlingvoj. Enkonduko). Pri la enhavo de la libro kp. „der esperantist“ n-ro 130, p. 32; n-ro 131, p. 55—61. En la ĉeforgano de la Centra Komitato de Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio (SED) „Neues Deutschland“ oni jam publikigis prezenton de la libro (28./29. 12. 85) sub la titolo „Kennen Sie Eni oder Novial?“ Mendojn akceptas en GDR ĉiu librovendejo [Bestell-Nr. 7535643 (7534)]. Jen la ĉapitraro:

Antaŭparolo (p. 9)
Enkonduko (p. 11—17)
1. Lingvoplanado kaj planlingvoj (p. 18—65)
1.1. La organismokoncepto pri la lingvo
1.2. Konscia influado je la lingvo
1.3. Artefaritaj lingvoj (artlingvoj) kaj artefarita lingvo-kreado
1.4. Pri kelkaj rezultoj de la konscia lingvokreado en etnaj lingvoj
1.4.1. Ŝanĝiĝo de statuso de etna lingvo al nacia lingvo
1.4.2. Influado en la sfero de la skribo
1.4.3. Konscia lingvodirektado en la leksiko
1.4.4. Kelkaj antaŭkondiĉoj por la sukceso de konscia lingvodirektado
1.5. Lingvoplanado
1.6. La termino ‚planlingvo': sinonimoj kaj nocia kampo
1.6.1. Nomoj kaj terminoj kun la signifo-markiloj „deveno, genezo“
1.6.2. Nomoj kaj terminoj kun la signifo-markiloj „Komunika rolo, apliko-celo“
1.6.3. ‚Internacia planlingvo'
1.7. Rilatoj inter lingvoplanado kaj planlingvoj
2. Planlingvo: Pri la motivoj de estiĝo kaj imagoj pri kapablo kaj strukturo (p. 66—98)
2.1. Nombro de planlingvoj
2.2. Ĉefaj motivoj por la kreado de planlingvoj
2.3. Aŭtoroj de planlingvoj
2.4. Lingvistoj pri kapabloj, ecoj kaj strukturo de planlingvo
2.4.1. Pri la pritaksado de lingvaj ecoj
2.4.2. Aplikokampoj de planlingvo
2.4.3. Ĝeneralaj ecoj: facileco kaj reguleco
2.4.4. Strukturo de planlingvo
2.4.4.1. Alfabeto kaj ortografio
2.4.4.2. Sonstrukturo
2.4.4.3. Leksiko
2.4.4.4. Gramatiko
3. Planlingvoj (resp. projektoj): Klasifikado kaj ĉefaj reprezentantoj (p. 99—218)
3.1. Klasifikoj
3.1.1. La tradicia klasifiko de Moch/Couturat/Leau
3.1.2. La klasifiko de kuznecov
3.1.3. La klasifiko laŭ la reala komunika rolo de la sistemoj en la praktiko
3.1.4. Aliaj klasifikoj
3.2. Pazigrafioj
3.2.1. Pri la esenco de pazigrafioj
3.2.2. Aprioraj pazigrafioj
3.2.3. Aposterioraj pazigrafioj
3.3. La plej gravaj planlingvoj
3.3.1. Aprioraj projektoj
3.3.1.1. Filozofiaj lingvoj
3.3.1.2. Aliaj aprioraj projektoj
3.3.2. Aposterioraj sistemoj
3.3.2.1. Modifitaj etnaj lingvoj
3.3.2.1.1. Modifitaj klasikaj lingvoj
3.3.2.1.2. Modifitaj modernaj lingvoj
3.3.2.2. Elektaj lingvoj
3.3.2.2.1. Kompromisaj lingvoj
3.3.2.2.2. Naturalismaj lingvoj
3.3.2.2.2.1. Occidental-Interlingue
3.3.2.2.2.2. La International Auxiliary Language Association (IALA)
3.3.2.2.2.3. Interlingua (Gode)
3.3.2.2.3. Aŭtonomaj lingvoj. Ido
3.3.2.2.4. Integrecaj lingvoj
3.3.3. Apriore-aposteriore miksitaj lingvoj. Volapuko
4. Esperanto (p. 219—292)
4.1. Ludwig L. Zamenhof kaj lia lingvo-politika rolo
4.2. La lingva strukturo
4.2.1. La minimuma gramatiko de 1887
4.2.2. Grafemoj kaj fonemoj
4.2.3. La morfemoj de Esperanto
4.2.3.1. La morfeminventaro
4.2.3.2. Fontoj de la morfemaro
4.2.4. Vortfarado
4.2.5. La vorto kaj ĝia signifo
4.2.6. Strukturo de la leksiko
4.2.7. Morfologio kaj sintakso
4.2.8. Lingvaj tavoloj kaj funkciaj stiloj
4.2.9. Evoluo, stabileco, normo
4.3. La komunika komunumo
4.4. Apliko en la praktiko
5. Planlingvoj kaj interlingvistiko (293—295)
6. Bibliografio (p. 299—381)
6.1. Antaŭrimarko
6.2. Mallongigoj
6.3. Sistema bibliografio
6.3.1. Bibliografioj
6.3.2. Historio kaj teorio de planlingvoj. Problemoj de la internacia lingva komunikado.
6.3.3. Pazigrafioj
6.3.4. Aprioraj planlingvoj
6.3.5. Latino sine flexione kaj aliaj modifitaj klasikaj lingvoj
6.3.6. Basic English kaj aliaj modifitaj modernaj lingvoj
6.3.7. Occidental-Interlingue z
6.3.8. Interlingua
6.3.9. Ido
6.3.10. Aliaj aposterioraj planlingvoj
6.3.11. Volapuko kaj aliaj aposterioraj-aprioraj miksitaj lingvoj
6.3.12. Esperanto. Superrigardoj.
6.3.13. Gramatikoj kaj vortdroj
6.3.14. Ortografio kaj fonologio
6.3.15. Vortfarado de Esperanto
6.3.16. Leksikologio de Esperanto
6.3.17. Gramatiko de Esperanto
6.3.18. Esprimiloj, stilo, evoluo kaj normo de Esperanto
6.3.19. Esperanto en la praktiko
6.3.20. Aliaj studoj pri Esperanto
6.3.21. L. L. Zamenhof: vivo kaj verko
6.3.22. Interlingvistiko kaj esperantologio
6.3.23. Alia uzita literaturo
Indekso de personoj (p. 382—394)
Indekso de temoj (p. 395—408)

14-a Plenkunsido de la Centra Estraro de GDREA

La 21-an de februaro 1986 en Zwickau okazis la 14-a plenkunsido de la Centra Estraro de GDREA. La Estraro pritraktis kelkajn aspektojn de la aktuala internacia politiko lige al la taskoj de la membroj de GDREA, aparte priparolis la signifon kaj eblajn sekvojn de la UNESKO-rezolucio pri Esperanto kaj donis larĝan diskuteblecon pri la aktuala rolo de la Esperanto-grupoj. La Centra Estraro dankis Hanna Scheffs pro longjara gvidado de la Distrikta Estraro Potsdam de GDREA. Pro sankaŭzoj ŝi forlasis la postenon sed restos en la Centra Estraro. Nova prezidantino elektiĝis Rosen Trenner, kiu pro la ofico fariĝis ankaŭ membro de la Centra Estraro.

Prelego en teknika altlernejo

„Ĉu ni venkos la lingvan barieron? Spertoj kun internaciaj planlingvoj" estis la titolo de prelego, kiun prezentis d-ro Detlev Blanke antaŭ ĉirkaŭ 50 aŭskultantoj la 2-an de marto 1986 kadre de scienca matineo en la Teknika Altlernejo Ilmenaŭ.

2a renkontiĝo en Turingio

La dua junulara esperantista renkontiĝo okazis de 27. — 30. 9. 85 en Eisenach. 18 gejunuloj diskutis problemojn de la junulara agado, vizitis teatron, migradis, dancis laŭ diskomuziko kaj vizitis la aŭtomuzeon kaj la domon de Bach.
Dum aŭtuno 1986 okazos la 3a turingia renkontiĝo de junaj esperantistoj.
(laŭ raporto de Ch. Kuhles)

SEFT '85 kaj '86

De 17a ĝis 24a de aŭgusto 1985 okazis la tradicia Somera Esperantista Familia Tendaro en la laga regiono de norda GDR sur kampadejo Thomsdorf. Partoprenis 85 personoj el Francio, GDR, Nederlando kaj Pollando.
Ankaŭ 1986 okazos SEFT, nome de 16. — 23. 8. 1986. Informojn donas: Werner Pfennig, DDR — 2000 Neubrandenburg, Leibnitzstr. 5/67

Invito al PoSET '86

En PoSET 1985 (Potsdama-Somera-Esperantista-Tendaro) partoprenis 58 geamikoj el diversaj landoj kaj ĝuis la belecojn de la lagoriĉa Havel-pejzaĝo kaj de la arbara monteta regiono. Ili rigardis la arkitekturon de la urbo mem kun ampleksaj famaj parkoj, historiaj konstruaĵoj kaj artaĵoj.
Denove ni aranĝos renkontiĝon de esperantistoj en nia bela distrikta urbo Potsdamo proksime de la ĉefurbo Berlino.
De la 24-a ĝis la 30-a de aŭgusto 1986 denove ekzistos ebleco por tranoktado en junulara gastejo „Pirschheide" (en kabanoj aŭ propraj tendoj). Oni ne povas kuiri mem, sed ekzistas ebleco por maten — kaj vespermanĝo en la junulargastejo.
La prezo inkluzive maten — kaj vespermanĝo por 7 tagoj estas por eksterlandanoj 60,— markoj kaj por GDR-anoj 40,— markoj. Pliajn informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi ĉe s-ino Brigitte Raabe, DDR 1546 Staaken, Sulzbacher Steig 1.

IX. ITREE en Antonsthal 1986

La jam IXa Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro okazos de 5. — 10. oktobro 1986 en Antonsthal, subdistrikto Schwarzenberg. La partoprenkotizo estas 170 markoj. Informojn donas Rudolf Eichler, Hermann-Matern-Str. 21, DDR — 9430 Schwarzenberg, GDR, kaj Jaroslav Klement, kpt. Nálepky 7, CS—36004 Karlovy Vary, ČSSR

Intensivkurso de prof. d-ro Polensky

De 28-a de oktobro ĝis 2-a de novembro 1985 renkontiĝis 19 diversaĝaj gekomencantoj el diversaj partoj de GDR en Bollmannsruh ĉe Brandenburg kun prof. d-ro Polensky el České Budéjovice (ČSSR) por intensivkurso. Konsidere al la diversaj niveloj de la partoprenantoj la tasko helpi kaj progresigi al ĉiu ne estis facila por la ĉeĥa lektoro. Kursgvidantino Rosen Trenner (Falkensee) helpis se necesis foje per klarigantaj rimarkoj al la malpli fortaj lernantoj atingi komprenadon. Ŝi ankaŭ estis organizinta la kulturajn aranĝojn, ekzemple nian viziton ĉe la antifaŝista memorejo Bagow. Min persone profunde tuŝis la grandaj gajeco kaj simpleco de nia ĉeĥa amiko, ecoj, kiuj tute ne estas tipaj por germana akademiano. Gajaj Esperanto-kantoj, kiujn prof. Polensky ĉiam ree kantigis nin, ne ekestigis iun laciĝon. Veturante hejmen mi deziris, ke prof. Polensky baldaŭ denove venu en GDR-n, ĉi-foje por gvidi kurson por progresintoj kaj por ke estiĝu revido kun ĉiuj partoprenintoj.
Dankon al ĉiuj aranĝintoj, dankon ankaŭ al d-ro Detlev Blanke, kiu venis al Bollmannsruh por vespero kaj interese prelegis pri la laboro de GDREA.

Günter Schäfer

Rimarko de la redakcio
Bedaŭrinde ne plu estas plenumebla la komprenebla deziro al renkontiĝo kun prof. Polensky. La ĉeĥa lektoro forpasis tute neatendite fine de decembro 1985.

Intensivkurs in Bollmannsruh

In der Zeit vom 27. 10. — 1. 11. 1986 findet in einem sehr gut eingerichteten Schulungsobjekt in Bollmannsruh (Kreis Brandenburg) ein Intensivkurs statt.
Es werden zwei Gruppen (Anfänger und Fortgeschrittene) durch Lektoren aus dem Ausland und der DDR betreut. Die Unterbringung erfolgt in massiven und beheizbaren Bungalows. Täglich werden ca. 6 Stunden Unterricht geboten. Hinzu kommen kulturelle Veranstaltungen, Exkursionen und Vorträge. Die Gebühren betragen für Verpflegung, Übernachtung und Kursus M 125,—, die am Anreisetag zu bezahlen sind.
Interessenten melden sich direkt beim **Esperanto-Verband, Bezirksvorstand Potsdam, 1500 Potsdam, Mangerstr. 34/36,** und erhalten dann Anmeldescheine und Informationsblätter mit genauen Hinweisen. Anmeldeschluß: 30. 6. 86.

El la vivo de GDREA

Abonu!

1. Abonu jenajn revuojn ĉe GDREA

1.1. „Bulgara Esperantisto", organo de Bulgara Esperantista Asocio, 12 kajeroj, abonprezo 15 markoj
1.2. „Scienca Mondo", esperantlingva versio de la organo de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj, 4 kajeroj 30paĝaj, abonprezo 10 markoj.
1.3. „Esperantisto Slovaka", organo de la Slovakia Esperanto-Asocio 6 kajeroj 24 paĝaj, abonprezo 8 markoj. (Pro internaj problemoj Ĉeha Esperanto-Asocio provizore ne plu eldonas „Starton")

2. Jenaj revuoj estas aboneblaj ĉe la poŝto:

2.1. „der esperantist", 6 kajeroj (ĉe ĉiu poŝtoficejo)
2.2. „Hungara Vivo", Budapest, 6 kajeroj
2.3. „Pola Esperantisto", Varsovio, 4 kajeroj
2.4. „Homo kaj kosmo", Zagreb, 4 kajeroj, popularscienca astronomia revueto el Jugoslavio
2.5. „Budapeŝta Informilo", 12 kajeroj
2.6. „Juna amiko", Budapest, 3 kajeroj
2.7. „Paco", Sofio, 6 kajeroj

La titolojn 2.2. — 2.7. oni povas aboni nur ĉe: Zentralvertrieb des PZV, 7900 Falkenberg, Übigauer Str. 4

Al GDR-abonantoj de „Paco"

Ĉiu GDR-abonanto de „Paco" rajtas ricevi senpage la landojn eldonojn de „Paco". GDREA sendas al ĉiu petinto senpage:
— Ĉeĥoslovaka eldono 1984, 32 p.
— Ĉeĥoslovaka eldono 1985, 32 p.
— GDR-eldono 1985, 40 p.
Petu de Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR, 1080 Berlin, Charlottenstr. 60.

Por GDR-civitanoj!

Se vi veturos al internaciaj aranĝoj
kiuj okazos en ČSSR, Hungario kaj Bulgario kaj kostos pli ol vi ricevos ĉe via banko, petu informon ĉe GDREA pri ebla solvo.

Konkurso pri la „Jaro de la Paco"

Konkurson okaze de la Jaro de la Paco aranĝas la Esperanto-grupo Ŝverin. Inter la partoprenantoj ni lotumos unusemajnan senpagan restadon en nia urbo. Vian rakonton, kanton, poemon, desegnajon k. t. p. rilate al la temo, „La Paco kaj mi" sendu ĝis la fino de majo 1986 al: Kulturbund der DDR, Kreisvorstand des Esperanto-Verbandes, DDR-2750 Schwerin, Wilhelm-Pieck-Str. 8

„Sonntagskurs" in Hoyerswerda

Am 9. November 1986 findet in Hoyerswerda ein „Sonntagskurs" von 8 — 18 Uhr statt, in dem Fernkursteilnehmer und Esperantisten mit Grundkenntnissen sprachliche Auskünfte erhalten. Informationen bei Christel Kraus, 7700 Hoyerswerda, J.-G.-Herder-Str. 34.

Ponto de l' amikeco

Jam la trian fojon nia Stralsunda Esperanto-infangrupo (17 infanoj, 3 plenkreskuloj) gastis ĉe niaj slovakaj amikoj (12a — 19a de majo 1985), kaj ankaŭ nin vizitis jam du slovakaj infangrupoj. Tiu ĉi interŝanĝo komencigis novajn rilatojn ankaŭ inter la plenkreskuloj per tio, ke ni ĉi-jare povis fari amikecan kontrakton kun la Poprada grupo. Tiel laŭ nia koncepto tiuspecaj kontaktoj estas „pontoj de l'amikeco", kiuj servas la reciprokan estimon al aliaj popoloj kaj per tio kontribuas por pacaj kaj amikecaj rilatoj internaciaj. Post kelkhora restado en Dresdeno ni alvenis en Poprad, kie Inĝ M. Zvara kaj K. Varadi elkore bonvenigis nin kaj gvidis nin en nian tranoktejon, la tre belan domon de la Slovaka Esperanto-Asocio. Dum sekvaj tagoj ni migradis tra la belegaj Altaj Tatroj. Ni ankaŭ vizitis la belan urbeton Kežmarok kaj ties kastelon. Kulmino estis la veturo per kabina lifto al pinto Lomnický štit. Por ni ĉemaruloj la unikaj belecoj de Tatroj kun siaj pitoreskaj neĝokovritaj montegoj estas impresega travivaĵo. La lastan tagon ni denove renkontiĝis kun la Popradaj kaj Stara-Lubovnaja infanoj. Estis tre gaja renkonto. Ni travivis belegajn tagojn, kiuj ankoraŭ longe restos en nia memoro. Ni precipe dankas al la juna M. Zvara. Li ĉiam estis por ni bona kaj helpema akompananto. Ĝis revido en Stralsund

Manfred Goldenbogen

Friedenstreffen junger Esperantisten

Die Bezirksjugendkommission Esperanto Karl-Marx-Stadt bereitet zur Zeit ihr 2. Friedenstreffen junger Esperantisten vor. Dieses Treffen wird vom 25. — 28. September 1986 in der Jugendherberge an der Talsperre Pöhl stattfinden. Die Unterbringung erfolgt in Bungalows. Das Programm beinhaltet einen Besuch der Stadt Plauen mit einer Betriebsbesichtigung, ein Forum mit Arbeiter-Esperantisten, Singen am Lagerfeuer und vieles andere mehr. Die Teilnehmerkosten betragen für DDR-Bürger 50,— M und für ausländische Freunde 65,— M.
Da uns in dieser Herberge 80 Betten zur Verfügung stehen, können einzelne Interessenten, aber auch kleine Gruppen teilnehmen.
Weitere Informationen bzw. formlose Anmeldung bei Christian Papenmeier, 9156 Oelsnitz, Obere Hauptstr. 104 (Tel. Lugau 24 86).

Christian Papenmeier

Prospekto pri Thälmann en Esperanto

La konata memorejo pri Ernst Thälmann en Ziegenhals ĉe Berlin eldonis 1985 en Esperanto sian prospekton. La 8paĝa faldprospekto informas aparte pri la neleĝa kunveno de la Centra Komitato de Komunista Partio de Germanio, kiu okazis la 7an de februaro 1933 kaj kiun partoprenis 40 gravaj funkciuloj de la partio. La prospekto havas 7 fotojn. Ĝi estas senpage ricevebla por eksterlandanoj ĉe GDREA. GDR-civitanoj pagas —,50 markojn por ekzemplero. La prospekto estas tre bonvena materialo okaze de la 100a naskiĝtago de Ernst Thälmann, la neforgesebla prezidanto de la Komunista Partio de Germanio. La prospekton tradukis Fritz Wollenberg.

95 jaroj Esperanto-klubo de Ivanovo

De Karen Saranceva el Ivanovo/Soveta Unio, iama germana studentino el Rostock (Karen Boldt), nun studanta en Ivanovo, ni ricevis ampleksan materialon pri la agado de la fama rusa/sovetia Esperanto-klubo. Ni resumas la ĉefan enhavon:

Ivanovo troviĝas ĉirkaŭ 300 km nordoriente de Moskvo kaj havas riĉajn revoluciajn tradiciojn. 1905 en Ivanovo eklaboris dum la granda ĝenerala striko la unua urba soveto en tuta Rusio. Dum 72 tagoj la laboristoj havis la potencon. La politika klero de la laborista klaso en Ivanovo kreis bonajn kondiĉojn por la akcepto de la ideo de Esperanto. Jam en la jaro 1890 en Ivanovo-Voznesensk kreiĝis Esperanto-klubo, la dua en Rusio (post Moskvo) kaj la kvina en la mondo. La klubon fondis la fama Antoni Grabowski (1857—1921), kiu estis la unua, kun kiu Zamenhof parolis Esperanton. Malgraŭ la malvenko de la revolucio en la jaro 1905 la bolŝevistoj kredis je estonta sukceso kaj sin preparis spirite kreante kursojn por studi la verkojn de Gorkij, Nekrasov, Hercen, Černiševskij, Belinskij kaj aliaj. Oni ankaŭ decidis lerni Esperanton. Iniciatinto de la kurso estis la membro de la partia urbkomitato Grigori Ĉelišev. La kursanoj baldaŭ komencis internacian korespondadon kaj vekis la misfidon de la polico, kiu arestis la 26-an de aprilo 1913 multajn bolŝevistojn, inter ili ankaŭ la esperantistojn Ĉelišev kaj Kunkonkov. Du stratoj en Ivanovo hodiaŭ portas iliajn nomojn. Post la Oktobra Revolucio, en la jaro 1921, refondiĝis la klubo. 1926 la klubo havis 73 membrojn. Aperis artikoloj en la gazetaro, i. a. en „Rabočij Kraj" kaj „Leninec". En „Rabočij Kraj" aperis la rubriko „Voĉoj de la tuta mondo" kun letereltiraĵoj de esperantistoj el la tuta mondo. La esperantistoj de Ivanovo ankaŭ tradukis la verkon de V. I. Lenin „La ‚maldekstra radikalismo' — infana malsano de la komunismo". Grandan meriton por la evoluigado de la Esperanto-movado en Ivanovo havas la iama direktoro de la biblioteko de la Pedagogia Instituto Nikolaj Šumarin (1894—1971), ekde 1920 membro de KPSU. Li kolektis abundan materialon kaj kompilis 10 jarlibrojn pri la kluba agado. Li partoprenis en la Granda Patrolanda Milito kaj apartenis al la liberigintoj de Berlin. Post la fondo de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) la klubo fariĝis la baza organiza unuo de ASE en la teritorio de Ivanovo. Laboras nun 4 kursoj. La 14-an de decembro 1985 okazis publika solena kunsido por festi la 95-an jubileon de la Esperanto-Klubo de Ivanovo kun preskaŭ 150 partoprenintoj.

Zamenhof-festo en Kaunas

La 14 — 15-an de decembro 1985 okazis en Kaunas (Litovio) Zamenhof-festo. Krom kaŭnasaj geesperantistoj ĉeestis ankaŭ gastoj el aliaj urboj de Litovio kaj kelkaj el najbaraj sovetiaj respublikoj (Estonio, Belorusio) entute 147 personoj. Tiu jam tradicia Esperanto-aranĝo havis ampleksan programon. Post solena malfermo ni aŭskultis interesan prelegon de P. Čeliauskas „Zamenhof kaj Litovio". Informon pri la agado de Litova Filio de ASE renkonte la 100-jaran jubileon de Esperanto faris P. Jegorovas. Post la tagmanĝa paŭzo sekvis prelegoj pri Esperanto-Movado en Litovio en la periodoj 1887—1940 kaj 1950—1985, kiujn faris resp. E. Laiconas kaj P. Jegorovas. La duan tagon ni aŭskultis informon pri aktualaj taskoj de litovaj E-kluboj en la nuna periodo. Poste sekvis libera tribuno kaj interŝanĝo de spertoj. Estis ankoraŭ prelego „Esperanto-eldonado en Sovetio 1950—1985".
Post solena fermo okazis ekskurso tra Kaunas laŭ zamenhofaj lokoj, kiun gvidis P. Staŝys.
Ĉiuj ĉeestantoj estis tre kontentaj pri la aranĝo kaj adiaŭis la kaŭnasajn geesperantistojn kun sincera danko.

B. Trimakiene

TUTA — 86 en Žilina:

En la tagoj 26. 7. — 1. 8. 1986, senpere post TUSE, okazos jam 8-aj Turismaj Tagoj en Žilina — ČSSR. La organizantoj de TUTA estas la E-klubo en Žilina kune kun la Regiona komitato de SEA.
Dum TUTA la partoprenantoj vizitos la montaron Malgranda Fatra, kun la fama Vrátna — valo, Rokaron de Súlov kaj aliajn lokojn.
La piedekskursoj okazos en 3 kategorioj:
A — malfacilaj 15 — 25 km. ekskursoj,
B — mezlongaj 10 — 16 km. ekskursoj,
C — promenoj en la naturo 6 — 10 km.
C — kategorio estas konvena precipe por malpli junaj turistoj kaj por gepatroj kun infanoj. Por la partoprenantoj estas preparitaj ankaŭ tuttaga busekskurso, rostado de lardo kun gustumado de slovaka brando, vesperaj amuzprogramoj kaj trarigardo de la urbo.
Detalajn informojn kaj aliĝilojn petu ĉe: Inĝ. Juraj Gendžúr, Levocská ć. 3/28, Vlćince 3, 010 08 Žilina — ČSSR.

Forpasis Grigorij Demidjuk (1895 — 1985)

La 6an de novembro 1985 forpasis unu el la plej elstaraj veteranoj de la sovetia Esperanto-movado, Grigorij Prokopjevič Demidjuk. Li estis dum la 20a-j kaj 30-aj jaroj la organiza sekretario de la Sovetrespublikara Esperantista Unuiĝo (SEU), redaktoro de „Sennacieca Revuo", „Nova Epoko", „Meždunarodnij Jazyk", „Bulteno de la Centra Komitato de SEU" kaj aliaj. El lia plumo venis la traduko de „Ŝtato kaj revolucio" de Lenin kaj aliaj tradukoj kaj originalaj kontribuaĵoj.
Demidjuk estis ne nur brila esperantisto sed ankaŭ elstara komunisto, sciencisto (kandidato de teknika scienco). Sortobatoj ne povis klini lin. Mi neniam forgesas la altstaturan, bluokulan Demidjuk, kiam mi havis la feliĉon renkonti lin la 28an de aprilo 1982[1]) en moskva apartemento. Feliĉe mi povis surbendigi intervjuon. Nek perdiĝos liaj verkoj kaj voĉo, nek nia memoro pri li.

Detlev Blanke

[1]) Komparu „der esperantist" 123 (1/84), p. 5—7; 132 (4/1985), p. 82

SOMERA ESPERANTO-UNIVERSITATO 1986. 27. VI-3. VII. Gyula-Hungario

Jam la 24-an fojon atendas vin la Somera Esperanto-Universitato en malgranda hungara urbo Gyula, organizita de Asocio por Disvastigi Sciencajn Konojn. Apud la tutsemajna esperantlingva programo atendas Vin la kuracbanejo, mezepoka burgo, muzeoj de Gyula. Oni povas aŭskulti prelegojn pri diversaj sciencaj temoj, ekz. F. Liszt, pri la hodiaŭa Hungario, daltonismo, birdaro de Nederlando, fonetiko de Esperanto, geologiaj demandoj kaj aliaj. La programon kompletigas tri sekcioj: pedagogia-didaktika, medicinista kaj kooperativisma. Tiuj ofertas al Vi prelegseriojn pri la koncerna temo. Vi povas partopreni tuttagon ekskurson, piknikon, teleskopan rigardan, lingvoekzamenojn filmposttagmezon, orgenkoncerton, folklorajn programojn.
Partoprenkotizoj:
En hotelo: 3790,— forintoj, se vi petas tutan servon, (3310,— forintoj sen ekskurso kaj pikniko)
En studenthejmo: 2660,— forintoj (2180,— forintoj sen ekskurso, pikniko)
Adreso: TIT Városi Szervezete, Somera Esperanto-Universitato, H-5700 Gyula 48-as u. 11 — Hungario

19-a IREN en Abaliget

De 5 .— 14. 7. 86 Teritoria Komitato Hungara Esperanto-Asocio kun Departementa Naturamika Asocio organizas por esperantistaj naturamikoj la 19-an INTERNACIAn RENKONTOn NATURAMIKAn en Abaliget. La kampadejo situas proksime al la dumiljara urbo Pécs.
Programo i. a. enhavos:
— interkona kaj adiaŭa vesperoj, ĉifona balo, matena gimnastiko, Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresintoj, malkovro de la Mecsek-montara regiono, perpiedaj kaj aŭtobusaj ekskursoj, konkursoj: „Kion vi scias pri Hungario?", societaj ludoj, naĝokonkurso, nokta boatado surlaga kun lampionoj, prezentado de popoldancoj.
Kotizoj en kategorio de tranoktejoj por 1 persono:
A) en ĉambro kun unu aŭ du litcj en somera domo (kun duŝejo) 3400.— Ft-oj
B) en ĉambro kun unu aŭ du litoj en somera domo (kun lavejo) 3200.— Ft-oj
C) en ĉambro kun du litoj (lavniĉo) 3000.— Ft-oj
D) en ĉambro kun 12 aŭ 20 litoj 2500.— Ft-oj
E) kun propra tendo 2100.— Ft-oj
La kotizo inkluzivas 9 tranoktojn, po 3-fojan manĝadon kaj ĉiujn programerojn.
La servoj komenciĝas per vespermanĝo de la 5-a de julio kaj finiĝas per tagmanĝo de la 14-a de julio 1986.
Limdato de aliĝo: 1986—06—15
La aliĝo validas nur kun minimuma antaŭpago de 1800 forintoj aŭ la tuta kotizo, kio estas ĝirebla ankaŭ el la socialismaj landoj pere de ŝtataj bankoj. [Necesas dokumento de GDREA. Rim. de la red.]
La pagita sumo pro rezigno ĝis la 5-a de junio estas disponebla por la 20-a IREN. Je rezigno postdata la antaŭpago servas por la menditaj tranoktejoj.

1) **IREN estas esperantista kaj turista renkonto.**
Por ekskursoj, kampadeja restado taŭgaj ŝuoj, vestajoj estas necesaj.
2) La kapacito de la kampadejo permesas akcepti 100 personojn. La kategorioj estas elekteblaj ĉe frua aliĝo.
3) La kampadejo disponas pri varma akvo en lavejoj kaj duŝejoj.

Per detalaj informoj estas je via dispono kaj atendas vian baldaŭan aliĝon.
IREN, DEPARTEMENTA KOMITATO de HEA, Pécs, Pf. 2. H-7601

Someraj Esperanto-Kursoj en lingvolaboratorio, 3. — 13. 8. 1986

Komitato de HEA en departemento VAŜ jam la sesan fojon aranĝos aŭdvidajn kursojn de Esperanto en lingvolaboratorio, en la moderna kulturcentro de urbo Szombathely.
Departemento VAŜ situas ĉe la okcidenta landmilo de Hungario, ĉe la piedoj de Alpoj. Ĝia centro estas Szombathely, kie jam la romianoj havis urbon nomatan Savaria.
Tiutempe ĝi estis religia centro, pri tiu fakto atestas la postrestintaj memorajoj de la t. n. Sanktejo de Izido, diino de la fekundeco. Al Savaria portis ĝin Egiptaj soldatoj de la Romia armeo. Ekde la XVIIIa jarcento la urbo rapide evoluis: ĝi fariĝis en 1777 sidejo de episkopo, fondiĝis presejo, iĝis grava fervoja centro.
En tiu ĉi historia urbo okazos la kursoj de Esperanto en lingvolaboratorio. Ĝis nun dum la kursoj regadis vera internacia atmosfero, ĉar pli ol 70 procentoj de la partoprenintoj estis eksterlandanoj, entute el dek landoj (Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germanio[1]), Jugoslavio, Norvegio, Nederlando, Pollando, Rumanio, Sovetunio kaj Hungario). Instruado okazos de la 8a ĝis 12a horo en tri diversaj grupoj: por netaj komencantoj, por komencantoj kaj por progresintoj. La unua servo estos vespermanĝo la 3an, la lasta tagmanĝo la 13an de aŭgusto. La ceteraj servoj: tranoktigo en 4-litaj ĉambroj, manĝado trifoje tage. Posttagmeze okazos banado, urborigardado, vizitado de muzeoj kaj de nova galerio, ekskursoj. Estos prelegoj, kantlernado, interkona vespero, adiaŭa vespero. Aŭtobusaj ekskursoj estas aranĝotaj al pitoreskaj urbetoj Köszeg, Sárvár kaj al vilaĝo Ják (katedralo el la XII-a jarcento).
La partoprenkotizo estas 2800 hungaraj forintoj. Ĝi inkluzivas ĉion. Anoj de HEA kotizas nur 2700 forintojn. Partoprenantoj anoncu sin **ĝis la 15a de junio 1986,** kaj transpagu la kotizon per poŝtmandato ĝis la 25a de junio 1986 al la suba adreso:
Komitato de HEA en dep. VAS **Szombathely** Pf. 45. H-9701, Hungario. Eksterlandanoj, se havas eblecon, tiam bonvolu transpagi la partoprenkotizon al la adreso de la banko: MNB. H-9700 Szombathely, Esperanto, OTP 853-1498.
Eksterlandanaj grupoj povos aliĝi ĉe Esperanto-Sekcio de Vojaĝoficejo „EXPRESS", Budapest 62. Pf. 567. H-1395.

[1]) Nepreciza indiko flanke de la hungaraj kolegoj.

Literatura Konkurso

DISTRIKTA SOVETO DE KULTURO
DISTRIKTA ESTRARO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO-STARA ZAGORA

ANONCAS

Internacian Literaturan konkurson por poezio, eseo aŭ skizo en Esperanto, okaze de la 100-jara jubileo de Internacia Lingvo Esperanto. La konkurso estas publika.

Premioj:

Por poezio:
I premio — 200 lv.
II premio — 100 lv.
III premio — 80 lv.

Por eseo aŭ skizo:
I premio — 200 lv.
II premio — 100 lv.
III premio — 80 lv.

Maksimuma amplekso:
Por poezia ero-120 versoj, por eseo aŭ skizo unu presfolio (= 16 manuskriptaj paĝoj). Ĉiu aŭtoro rajtas konkursi per tri eroj.

Temo:
„La revolucia pasinto, nuntempo kaj estonto de Stara Zagora kaj la distrikto". Detala espliko pri Stara Zagora kaj Stara Zagora distrikto estas disponigebla al ĉiu petanto.

Lasta limtempo — 20-a de februaro 1987 (validas la dato de poŝtstampo).

Konkursa prijuĝo — 22-a de majo 1987. La verkoj estos publikitaj en Esperantaj periodajoj.

La verkojn sendu en du ekzempleroj, tajpitaj al adreso:
BULGARIO, 6000 STARA ZAGORA, bul. „G. DIMITROV" N 101'' A''. DISTRIKTA ESTRARO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO.
POR LITERATURA KONKURSO.

ESPERANTAJ LIBROJ EL HUNGARIO

Folgende Bücher befinden sich zur Zeit im Buchladen des Ungarischen Kulturzentrums, 1020—Berlin, Karl-Liebknecht-Str. 9 (Tel. 2 12 28 78, Koll.n Zehe)
Das Kulturzentrum versendet auch Bücher nach Bestellung. Nachbestellungen sind möglich.

A Lernolibroj ,vortaroj, bildrakontoj

— Lienhardt, A.: Amuzaj dialogoj. (Sprita studmaterialo por progresigaj kursoj. Karikature ilustrita.) 21 cm, 144 p. Prezo: 10 M
— Lienhardt, A.: Amuza legolibro en Esperanto. (Cent amuzaj historioj, karikature ilustritaj; ĉiun historion sekvas po 10 didaktikaj demandoj kaj respondoj.) 215 p., 21 cm. Prezo: 18,75 M
— Seppik, H.: La tuta Esperanto. (Kurslibro por progresantoj kun multaj gramatikaj kaj stilaj ekzercoj.) 184 p., 21 cm. Prezo: 16,25 M
— Taskfolioj por komencantoj. (32 taskfolioj en formato A4.) 28 cm. Prezo: 6,25 M
— Golden, B.: Marĝene de la lernolibro. (Prilingvaj artikoloj por kursfinintoj.) 70 p., 20 cm. Prezo: 7,50 M
— Oklingva nomaro de Eŭropaj birdoj. (Angla-germana-rusa-pola-ĉeĥa-latina-hungara-Esperanta.) 28 cm, 138 p. Prezo: 10,— M
— Baghy, J.: La Verda Koro. (Romano por komencantoj, verkita kun granda didaktika disciplino. Kun gramatika resumo kaj vortlisto. Uzebla ankaŭ kiel lernolibro por komencantoj.) 104 p., 20 cm. Prezo: 12,50 M

B Beletro

Originalaj verkoj:

— Huleŝ, A.: Katoj kaj ĉevaloj. (Poemaro kun profunda filozofio kaj lingva eksperimentemo.) 80 p., 20 cm. Prezo: 12,50 M
— Lorjak: Eŭlalia. (Humura kriminalroman-parodio de elstara franca esperantista prozisto.) 188 p., 21 cm. Prezo: 22,50 M
— Lorjak: Iluzioj. (Dek noveloj de la popularа prozisto; unu ankaŭ en la angla, kaj du en franca traduko.) 184 p., 21 cm. Prezo: 20 00 M
— Nemere, I.: La blinda birdo. (Romano en aventura stilo pri tio, kiel blanka kaj nigra verkistoj kune batalas kontraŭ la Sud-Afrika reĝimo. La romano gajnis la premion „La Libro de la Jaro 1983".) 118 p., 21 cm. Prezo: 15,00 M
— Nemere, I.: Febro. (Romano, tre lerte kuniginta aman, dedektivan kaj psikologian temojn.) 131 p., 21 cm. Prezo: 16,25 M
— Nemere, I.: La Monto. (Originala romano pri eta paca komunumo, vivante sur alta monto — tamen tie senspure malaperis kvar homoj. Ĉu la pacaj montanoj murdis ilin?) 168 p., 21 cm. Prezo: 7,50 M
— Nemere, I.: Sur kampo granita. (Romano pri oficiro de la germana armeo, kiu post. 25 jaroj revenas en italan vilaĝon, kie li ekzekutigis familion . . .) 124 p., 21 cm. Prezo: 15,00 M
— Gorov, Ĥ.: Ribela Kordo. (Revoluciaj poemoj el la vivo de partizano kaj revoluciulo.) 71 p., 7,50 M
— Grigorov, A.: Gardu la pacon! (Elekto el poezia kreaĵo de la iama sekretario de Georgi Dimitrov.) 116 p., 10,—M
— Almanako de bulgaraj esperantistoj. (Poemoj kaj prozajoj de 30 bulgaraj esperantistoj-literaturistoj.) 141 p., 16,25 M
— Tóth, E.: Lappar, la Antikristo. (Noveloj kun profunda filozofio kaj vivokono. La volumo gajnis la premion „La libro de la Jaro 1982".) 144 p., 19 cm. Prezo: 12,50 M

Tradukitaj verkoj:

— Gajdar, A.: Timur kaj lia taĉmento. (Klasika junulara romano de la sovetia literaturo.) 74 p., 21 cm. Prezo: 10 M
— Heltai, J.: La Morto kaj la kuracisto. (Humura novelo kun paralelaj tekstoj en la hungara kaj Esperanto.) 18 p., 20 cm. Prezo: 1,75 M
— Hund-bazaro. (33 porinfanaj poemoj el la hungara literaturo. Kun dukoloraj ilustrajoj.) 68 p., 19 cm. Prezo: 10,— M
— Hungaraj Fabeloj. (Dek hungaraj fabeloj kun ilustrajoj.) 71 p., 21 cm. Prezo: 7,50 M
— Hungara Antologio. (Specimenoj el la hungara literaturo ekde la 12a jarcento ĝis nun.) 447 p., 24 cm. Tole bindita. Prezo: 75,— M
— Karinthy F.: Vojaĝo al Faremido — Kapilario. (Du klasikaj scienc-fikciaj romanoj.) 182 p., 18 cm. Prezo: 16,25 M

— Krudy, Gy.: La rozo de l' sultano. (Fabela rakonto el la 17a jarcento. Riĉe ilustrita.) 54 p., 14x20 cm. Prezo: 10,— M
— Moricz, Z.: Varmega kamparo (Romano, pri la malmoraliginta hungara meznobelaro.) 170 p., 18,75 M
— Azlányi, K.: Sep vangofrapoj. Romano, 150 p., 15,— M
— Kemalov, N.: Naŭ jaroj en la infero. Travivaĵoj de bulgara antifaŝisto en germanaj koncentrejoj (i. a. Oranienburg). 111 p., 10,— M
— Velkov, K.: Vilaĝo Borovo. (Sorto de bulgara montara vilaĝo.) Romano, 130 p., 15,— M
— Móricz Zs.: Ĉiela birdo. (Amrakonto kun drama atmosfero el la hungara vilaĝo jarcentkomenca.) 44 p., 21 cm. Prezo: 7,50 M
— Móricz Zs.: Malriĉaj homoj. (Animskua kontraŭmilita rakonto pri soldato, kiu reveninte el la milito daŭrigas la murdadon.) 36 p., 24 cm. Prezo: 3,— M
– Petöfi, S.: Johano la Brava. (Popolfabelo en versoj, majstre tradukita de K. Kalocsay.) 60 p., 21 cm. Prezo: 12,50 M
— Tutmonda Sonora I—II. (Riĉa antologio de la monda poezio en la majstra traduko de K. Kalocsay. 581 poemoj de 185 poetoj.) 664 p., 21 cm. Tole bindita. Prezo: 81,25 M

C Pri lingvo, movado, literaturo

— Gvidlibro por supera ekzameno. (Historio-literaturo-metadiko de Esperanto.) 358 p., 19 cm. Prezo: 15,— M

D Komputado

— Kibernetiko de la homa lingvo. Red. H. Frank. (Materialo de la IX-a Internacia Kongreso de Kibernetiko.) 192 p., 21 cm. Prezo: 17,50 M
— Mikrokomputilo. (Ilustrita artikolaro pri personaj komputiloj.) 64 p., 24 cm. Prezo: 7,50 M
— Apliko de komputiloj en industrio kaj administrado. (14 prelegoj de Interkomputo '82.) 215 p., 24 cm. Prezo: 17,— M
— Retoj. (Ilustrita artikolaro.) 64 p., 24 cm. Prezo: 7,50 M
— Datumbazoj. (Ilustrita artikolaro.) 64 p., 24 cm. Prezo: 7,50 M
— Programada Teknologio. 64 p. 7,50 M

E Ceteraj temoj

— 133 tagoj. (Artikoloj kaj literaturaĵoj pri la unua hungara proleta ŝtato en 1919.) 244 p., 19 cm. Ilustrita. Prezo: 16,25 M
— Metodiko en la praktiko. (Red. Zs. Barcsay. Artikoloj pri la metodiko de la lingvo-instruado.) 140 p., 21 cm. Prezo: 17,50 M
— Programdeklaro de la Hungara Socialisma Laborista Partio. 41 p., 18 cm. Prezo: 1,25 M
— Sciencaj Komunikaĵoj 1982. (Artikoloj pri diversaj sciencoj.) 66 p., 21 cm. Ilustrita. Prezo: 10,— M
— Turista Kantaro. (51 kantoj kun muziknotoj.) 84 p., 21 cm. Prezo: 10,— M
— Urbo Tata. (Gvidlibro pri malgranda hungara historia urbo.) 36 p., 21 cm. Ilustrita. Prezo: 3,75 M
— Geologio Internacia 1984. (Artikoloj pri geologio.) 255 p., 21 cm. Prezo: 15,— M
— Radioteknika artikolaro. 88 p., 24 cm. Prezo: 11,25 M
— Dilemoj de la nuntempo — vide el Hungario. (Sociologiaj kaj ekonomiaj studoj pri la ŝanĝoj nuntempe okazantaj en Hungario.) 104 p., 2 1cm. Prezo: 16,25 M
— Sciencaj Komunikajoj 1976. 70 p., 10 ,— M
— Sciencaj Komunikajoj 1979, 82 p., 10,— M
— Sciencaj Komunikajoj 1985, 93 p., 10,— M
— Auld. W.: Paŝoj al plena posedo. (Kurslibro por progresantoj, ŝercoj), 239 p., 21 cm. Prezo: 16,25 M
— Esperanta-Kamboĝa Vortaro. 148 p., 21 cm. Prezo: 25,— M
— Szilágyi, F.: La vivo de Sándor Kőrösi Csoma. (Aventura biografio de hungara orientalisto. Kun pli ol 100 ilustrajoj.) 151 p., 21 cm. Prezo: 16,25 M

Letero pri „Juna amiko"

Skribis al ni la redaktoro Oszkár Princz el Budapeŝto: „Post pli ol du jaroj, kiuj pasis ekde la momento de la reapero de JUNA AMIKO, ni sukcesis eldoni la mankantajn numerojn de la antaŭa periodo kaj restarigi la regulan eldonritmon.

Tio espereble kuraĝigis pliajn interesatojn por aboni la revuon kaj niajn potencialajn kunlaborantojn, kies helpon ni bezonas. JUNA AMIKO estas revuo porjunulara, tio signifas ankaŭ prijunulara. Tial ni ŝatus informi pli multe ol ĝis nun pri la vivo de la junaj homoj en diversaj landoj ĝenerale kaj pri la vivo de la juna generacio de esperantistoj, pri la lernantoj kaj instruistoj de la zamenhofa lingvo.

Ja aperas trifoje jare sur 72 paĝoj. Uzante 700 vortradikojn ĝi publikigas rakontojn, poemojn, kantojn kaj diversajn interesaĵojn, instruas kaj amuzas per facilaj tekstoj. Eldonas Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, Kenyérmezö u. 6., redaktas O. Knichal. Abonoj: en la soc. landoj ĉe la resp. landa asocio aŭ ĉe la poŝto, en aliaj landoj ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015. BJ Rotterdam, Nederlando.

Helpu nin, sendante viajn kontribuaĵojn — artikolojn, fotojn ktp. pri la agado de la junularo!

Postrimarko de la redakcio: La vere tre valora revuo estas abonebla ĉe Zentralvertrieb des PZV, 7900 Falkenberg, Ubigauer Str. 4.

Abonu, abonigu al „Paco"

La organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) „Paco", aperas 6foje jare kun 14paĝaj kojeroj. La kajeroj estas riĉenhavaj, ilustritaj. La preso kaj papero estas bonkvalitaj. En ĉiu numero oni trovas gravajn artikolojn pri la internacia pacmovado, pri literaturo aŭ lingvaj temoj. Al la 6 numeroj jare aldoniĝas 2 — 3 naciaj numeroj, kiujn la abonantoj de Paco ricevas senpage. Se vi ankoraŭ ne estas abonanto de „Paco" petu specimenon ĉe: Paco, Sofia 1000, p. k. 66, Bulgario. Pro la jaro de paco la redakcio donacos al ĉiu nova abonanto po tri jam aperintajn numerojn de la revuo. Civitanoj de GDR povas aboni la revuon ĉe: Zentralvertrieb des PZV, 7900 Falkenberg, Ubigauer Str. 4. Jara abono kostas 37,— markoj.

Kiu konis Walter Lösch?

Dum la dudekaj jaroj la bulgara esperantisto Ivan Keremidĉiev-Esperov (Kv. Borovo, bl. 219, vh. 3, 1680 Sofio) korespondis kun la laboristo Walter Lösch el Chemnitz-Markendorf.

Kiu scias ion pri lia sorto, bv. skribi al la bulgara kamarado.

ALVOKO al ĉiuj

Esperanto-organizaĵoj

La internacia simpozio pri Esperanto kaj turismo, okazinta en la periodo 11 — 16 de septembro 1985 — en IEK, Pisanica, Bulgario, organizita de Universala Esperanto-Asocio (UEA), Internacia Asocio „Monda Turismo" kaj Bulgara Esperantista Asocio (BEA), kun partoprenantoj el Belgio, Bulgario Greklando, Hispanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Pollando, Rumanio, Sovet-Unio kaj Svedio konstatis, ke:

— La internacia turismo rapide evoluas, atingante jam pli ol 300 milionojn da vojaĝantoj jare;
— en la internacia turismo la lingvaj baroj inter la popoloj estas aparte akre senteblaj kaj malhelpas leviĝon de la turisma nivelo;
— la internacia lingvo Esperanto povas ludi tre gravan rolon en la internacia turismo.

Pli vasta utiligo de Esperanto en tiu-ĉi sfero servas ne nur al disvolvo de turismo, sed ankaŭ al altigo de ĝia prestiĝo kaj ties disvastigo.

Pro tio la simpozio turnas sin al ĉiuj Landaj Esperanto-Asocioj kaj organizaĵoj kun la jenaj proponoj:

— fondi komisionon, fakon aŭ alian organon aŭ instancon, kiu okupiĝu pri aplikado kaj disvastigo de la Esperanto-uzado en la turismo kunlabore kun vojaĝoficejoj, eldonejoj, turistaj organizaĵoj k. a.;
— mem organizi internaciajn aranĝojn por esperantistoj kaj turismajn aranĝojn, servantaj al popularigo de Esperanto inter neesperantistoj;
— kunlabori kaj apogi la aktivadon de la Internacia Asocio „Monda Turismo".

1985—09—14 De la simpozio
IEK Pisanica, Bulgario

Por ekspozicio en Parizo

Enkadre de la 100-jara jubileo de Esperanto ni turnas nin al la tutmonda esperantistaro cele al ekspozicio, kiun ni prezentos en Parizo dum la printempo de 1987.

Ni bezonas fotokopiojn de librotitoloj (malnovaj libroj pri la esperantista laborista movado notinde), afiŝojn (novajn kaj malnovajn), poŝtkartojn (pejzaĝojn, bildojn pri Esperanto kaj porpacaj temoj), turismajn prospektojn en Esperanto, insignojn, k. t. p. . . . Tiuj dokumentoj estu donacitaj aŭ pruntesenditaj. Kondiĉojn bonvolu precizigi. FEDERATION ESPERANTISTE DU TRAVAIL 179, rue Ordener, R—75018 Paris

JUNULARA SEKCIO DE UEA RICEVAS ATENTON EN UN-KUNVENO

Raporto de la Junulara Sekcio de UEA, TEJO, estis prezentita en „La junularo por pli bona mondo". Festado de Internacia Junulara Jaro, kiu okazis en la sidejo de UN la 14-an de novembro 1985. La tuttaga aranĝo, kiu prezentis neregistarajn grupojn el diversaj mondopartoj, okazis antaŭ plena spektantaro en la Salono Dag Hammarskjöld. Aldone al raportoj de neregistaraj organizoj, la Festivalo enhavis muzikajn kaj dancajn prezentojn. Malfermis ĝin la Ĝenerala Sekretario, s-ro Perez de Cuellar. La raporto de TEJO prezentis la laboron de tiu organizo kunlige kun la Internacia Junulara Jaro.

(UEA)

Magistra disertacio pri Zamenhof

Studento prilaboranta magistran disertacion serĉas sciencmaterialojn pri la filozofiaj kaj religiaj opinioj de L. L. Zamenhof. Andrzej B. Lewkowicz, ul. Panewnicka 76, PL—40 760 Katowice/Pollando.

Handikapuloj

Establinte memstaran sekcion de Esperantistoj-handikapuloj de Ĉeha Esperanto-asocio, ni volas interrilatiĝi kun samsortuloj-esperantistoj en ĉiuj landoj kaj serĉas personojn-esperantistojn aŭ esperantistajn grupojn interesiĝantaj pri problemoj de handikapitoj. Ni ŝatus ligi kontaktojn kun ili.

Oni skribu al la sekretario de la sekcio: Josef Vaněček, Na Libuši 630, 391 65 Bechyně. Ĉehoslovakio.

Ni funebras

— pro la neatendita forpaso de prof. d-ro Jaroslav Polenský el České Budéjovice la 23an de decembro 1985. Li sukcese gvidis kursojn en GDR.
— pro la forpaso de la iama laborista esperantisto Ewald Nier el Wilkau-Haslau, la 30-an de januaro 1986.

Forpasis Imre Kutas

Fine de 1985 forpasis en Budapest k-do Imre Kutas. Li estis dum multaj jaroj hungara ambasadoro en diversaj landoj. Kiel ĉefsekretario de Hungara Esperanto-Asocio li akiris reputacion kaj estimon.

Ni kore gratulas al

— s-ro Wilhelm Fritz el Berlin, pro lia 90a naskiĝtago, la 16an de januaro 1986
— s-ro Karl Meier el Berlin, pro lia 85a naskiĝtago, la 2. 2. 1986
— d-ro Peter Flögel el Berlin, pro lia 65a naskiĝtago, la 16an de januaro 1986

Ni gratulas pro la distingo

— per la Honora Insigno de GDREA al Fred Valtin el Neubrandenburg
— per la Johannes-R.-Becher-medalo en arĝento por d-ro Erich-Dieter Krause el Leipzig
— per la Johannes-R.-Becher-medalo en arĝento por Rolf Beau el Leipzia
— per la Johannes-R.-Becher-medalo en arĝento por Kurt Güse el Schwerin
— per la Johannes-R.-Becher-medalo en arĝento por Carola Lehr el Neubrandenburg
— per la Medalo okaze de la 40-a datreveno de la liberigo de Hungario al d-ro Imre Pethes, prezidanto de MEM, el Budapest
— per la Meritordeno de GDR en arĝento por Isaak Krolik el Smolensk, kiu intime kunlaboris kun germanaj laboristaj esperantistoj dum la dudekaj jaroj

Recenzoj

La Sciencaj Komunikaĵoj (numero marto 1985, 96 p.)

eldonita de S E C (Budapest) vere aspektas laŭforme kaj laŭenhave kiel tiaj publikaĵoj en aliaj lingvoj. La subtitolo Tekniko ne trafas ĉiujn artikolojn, sed la plimulto traktas diversajn kampojn de la teknikaj sciencoj. Apud kelkaj tre interesaj reklampaĝoj pri elektronikaj mezuraparatoj, pri pumpiloj kai pri mikroŝaltiloj ankaŭ la informoj pri propraj aferoj estas precipe menciindaj: temas pri la enhavo de la sekva kajero, pri anonco de du novaj scienc-popularigaj libroj, pri la taskoj de la konsilanta reto de S E C kaj indikoj pri la preparo kaj formo de manuskriptoj.

En la broŝuro jenaj teknikaj problemoj estas traktitaj: energi-konservado per inerci-rado, vakuotekniko, forteco de metaloj, pneŭmata ŝutaj-transporto, inĝeneria sismiko, tranĉa prilaboro, alojita aluminia konduktil-materialo. En la sekva mi skizas la enhavon de tiuj komunikaĵoj, donantaj superrigardon pri la elektita temo.

Post la prezentado de la energiformoj kaj klarigo de la neceso konservi kaj deponi energion (kiam la livero superas la konsumon) la aŭtoro de la unua artikolo venas al la inerci-rado, kalkulas, kiom da energio oni povas bufri en tia rado kaj kiel oni povas uzi ĝin en trajno. Fine li traktas la teknikan realigon kaj la avantaĝojn: energi-ŝparon, malpliigon de aermalpurigo, teknikajn plisimpligojn.

La verkinto de raporto pri vakuotekniko unue difinas kvin vakuointervalojn (de kruda vakuo ĝis ultravakuo), eksplikas la diversajn pumpilspecojn kaj iliajn povumojn kaj fine la mezurilojn por malaltaj premoj.

Ankaŭ tre interesa por nefakulo estas la resumo pri pneŭmata ŝutaĵ-transporto. Antaŭ la priskribo de la necesaj aparatoj kaj maŝinoj ĝeneralaj konsideroj estas faritaj:

— pri transportmaterialoj (greno, cemento, pulvoroj),
— pri transportmetodoj (suĉ- aŭ premtransporto),
— pri specifaj parametroj (grajndiametro, flukvanto, diametro kaj rezisto de transport-tuboj).

Laŭ la premgrando oni klasifikas la gasfluigilojn en tri kategoriojn: ventoliloj, bloviloj, densigiloj.

Ĝeneralan enkondukon en la sferon de tranĉa prilaboro formas alia kontribuaĵo de SK. Jenaj faktoroj ĉe tranĉado estas distingitaj: laborpeco, tranĉmovo, tranĉilo, splito. Laborpeco estas la prilaborenda objekto; la tranĉmovon oni dismetas en ĉef- kaj ŝovmovon kaj tiu movo karakterizas la diversajn labormanierojn: tornado, borado, rabotado, frezado, ŝlifado. La tranĉilojn oni povas diferencigi laŭ la nombro de akraĵoj, laŭ la materialo, laŭ geometrio de eĝoj, laŭ maniero de fabrikado. Por la dimensio de la detranĉitaĵo, la splito, formuloj estas donitaj.

En tre detala prezentado al apliko de konduktilmaterialoj estas analizita. La esplorcelo konsistas en la produktado de alojitaj alumini-bazaj konduktiloj, kiuj entenas la avantaĝojn de aluminio kompare kun plumbo kaj evitas la malavantaĝojn kompare kun kupro. Krom la jam listigitaj teknikaj kontribuoj SK enhavas ankoraŭ du teoriajn traktaĵojn. En unu artikolo surbaze de multaj ekzemploj la diferencaj laŭleĝecoj ĉe la evoluo de sciencaj nocioj estas prezentitaj. Por la akcelo de la evoluo de sciencoj ĝeneralaj metodoj kaj vojoj estas elmontritaj. En alia studaĵo la interrilato modelo-koncepto traktiĝas kaj ĝia kontribuo al evoluo de la konceptoj en la sciencoj estas esplorita.

Miaopinie la plej grava funkcio de tiu publikaĵo estas la kreo kaj firmigo de teknikaj terminoj. En tio la teknikaj sciencistoj (el Hungario, Nederlando, Sovetunio, Rumanio kaj GDR) aŭ la redaktoroj ankaŭ plej bone sukcesis. La plimulto da traktaĵoj ofertas revuon pri pli aŭ malpli ampleksa sfero, el kio profitiĝas la ĝenerala komprenebleco kaj per tio atingas pli vastan publikon. (Sola rimarko: La uzo de „kritikaj rivolunombroj" [p. 6] estas kritikenda, pli bone „krizaj r.")

Martin Schüler

Jerzy Zawieyski: Vizito de Prezidento Rakonto. El la pola lingvo tradukis Andrzej Pettyn. Eldonis: Pola Esperanto-Asocio. Varsovio 1984, 36 p.

La rakonto, kiun oni povus nomi granda dramo de malgranda homo, prezentas psikologian portreton de sesjara knabo. Li, Jaĉjo, arde sopiras je la amo de sia patro, kiu post divorco nur interesiĝas pri la nova edzino.

En la plej dolorigaj horoj de soleco Jaĉjon vizitas la Prezidento Venderdiko; kreaĵo de la imago de la knabo. Per la voĉo de la patro la Prezidento alparolas la infanon.

„Prezidento Venderdiko estas la Prezidento de ĉiuj infanoj kiuj ploras, ne sciante kial, kies patrinoj havas novan edzon, kies patroj havas novan edzinon, kaj ili mem estas forpuŝitaj, ĉar ili memorigas al la patroj la nedeziratajn patrinojn, aliflanke al la patrinoj ili memorigas la malbonajn patrojn."

De paĝo al paĝo por la leganto heliĝas la mondo, en kiu vivas Jaĉjo. La patro malatentas lin; li okupiĝas pri la nova infano, kiun naskis al li la nova edzino. La vera patrino malofte vizitas Jaĉjon; ŝi ja ĉiufoje havas donacojn por li, sed neniam sufiĉe da tempo. Pro la Prezidento oni suspektas la knabon esti malsana, kaj „avinjo" kun li iras al la kuracisto. Sed tiu evidentiĝas kiel bona amiko, kvazaŭ enloĝanto de Venderdik- lando . . .

La impresa enhavo, la facila lingvaĵo la plaĉaj infandesegnaĵoj kaj la senriproĉa traduko de Andrzey Pettyn certe faros tiun libreton ŝatata legaĵo.

R. Janke

KORESPONDDEZIROJ

Ni publikigos nur tajpitajn koresponddezirojn!

Soveta Unio

20j. studentino de fremdoj lingvoj dez. kor. tutmonde, kol. pm, bk: Helen Nagorniĥ, **610 002 Kirov,** str. Svoboda 122—210

23j. pentristo dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Nikolaj Vološin, **263 018 Luck Volinskaja obl.,** ul. Lvovskaj 63a, kv. 81

20j. studento dez. kor. kun juna esperantisto el GDR pri geografio, sporto: A. Supp, **200 000 Tallinn,** Peapostkontor, Estonio

18j. studentino dez. kor. tutmonde pri ŝako, lingvoj, literaturo, psikologio, arto, muziko, kol. bk: Julija Serbina, 2-Krasnodarskaja 129/2-97, **Rostov-Don 344 058**

Ingrida Češkevičiuté, **234 520 Kapsukas,** Kokkolos 7-24, Litovio, 14j. dez. kor. tutmonde kun samaĝuloj pri muziko, sporto kaj vivo

Žyginta Kavaliauskaité, **234 520 Kapsukas,** Pušinio 110-22, Litovio, 14j., dez. kor. tutmonde kun samaĝuloj pri muziko, sporto kaj vivo

Esperanto-grupo, 16—20j., dez. kor. tutmonde pri pacaj problemoj, lingvaj temoj k. a., skribu al: A. Osokin, **454 080 Čelabinsk,** ul. Engelsa, d. 61, kv. 40

Gujeva Nadejda, **600 017 Vladimir-17,** ul. Gorjkogo 34—88, dez. kor. tutmonde, kol. kalendaretojn, pm, bk

Dez. kor. tutmonde:
- Sirvydyte Meilute, **Utenos,** raj. Jotaučiis, pšt. Radeikiai, (17j.)
- Kolesnikovaite Daina, **234 580 Alytus,** Jaunimo gt. 14—13 (18j. studentino)
- Šeduikyte, Rita, **234 910 Utena,** Spalio 50-čio 68—12 (18j. studentino)
- Lukoševičiute, Daiva, **232 007 Vilnius,** Filaretis 23—7 (18j. studentino)
- Gužaite, Lina, Utenos raj. **234 915 Kuktiškés,** Bareišiis km (lerantino)
- Kolesnikova, Danute, **234 580 Alytys,** Jaunimo 14—13, 40j. instruistino
- Bagvilienė, Janina, **232 000 Vilnius,** V. Putnos gt. 12a—81, 27j. instruistino
- Rukšenaite, Violeta, Kirdeikiis vid. m.-la, 23j. instruistino
- Viburyte E. J., **234 911 Tauragnu** vid. m-la 27j. instruistino
- Augulyte, J. d., **234 911 Tauragnu** vid. m-la, 28j. instruistino

16j. komencantino dez. kor. tutmonde p. ĉ. t.: Dovile Krupickaite **232 049 Vilnius,** Architektu 65—49

15j. lernantino dez. kor. p. ĉ. t.: Antonina Kiriluk, ul. Petrovskogo 99, kv. 179, **340 120 Doneck**

15j. lernantino dez. kor., kol. bk, pm: Oksana Petrenko, ul. Petrovskogo 99, kv. 180, **340 120 Doneck**

37j. instruisto dez. kor. tutmonde, kol. materialojn pri E-movado: Kuzik Jaroslav, **275 601 Černovickaja** obl. Karapčiev

Gelernantoj, 11—12j., serčas leteramikojn. Nia adreso: **614 022 Permj,** str. Sivkova 3, škola 122, „esperanto"

25j. muzikinstruistino dez. kor. pri kantoj, muziko, muzika edukado de infanoj Marma Korotj, **252 200 Kiev 200** a/K 539/1.

Arunas Žabaltunas P. O. Box 1646, **232 010 Vilnius 10,** dez. kor. tutmonde, kol. bk. pm

20j. junulo dez. kor. p. ĉ. t.: Gintaras Žiausnys, Žemaitijos 9—25, **235 500 Mažeikiai,** Litovio

13—16j. gelernantoj dez. kor. tutmonde. Adreso: Klubo de internacia amikeco „Esperanto", Detskaja bilioteka-filial N3, ul. Tereškovoj N 41, **340 120 Doneck**

10—13j. komencantoj dez. kor. kun geamikoj el soc. landoj: Esperanto-rondeto, Klub „Gajdarovec", ul. Pintera 60, **340 120 Doneck**

Lernantino 15j. dez. kor. tutmonde, kol. bk, pm: Rytmetyte, Rasa, **234 900 Saldutiškis,** Utenos raj.

Leonid Mjasnikov, **182 100 Velikie Luki,** K.-Liebknecht-str. 3, kv. 15, dez. kor. tutmonde.

Mi preparas disertacion pri E-frazeologio, bezonas frazlibrojn, vortarojn, originalajn E-verkojn.

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16